E/330

HUNGARA VIVO

2-47

1968

1

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1968. VIII-a jaro, 1-a n-ro

Sur la frontpaĝo:
Puto Zsolnay: Pécs

Mortis Ferenc Szilágyi 1
Jenő Cseszkó: Hungaraj esperantistoj en Mez-Azio 2
László Tiszai: La 600-jara Universitato de Pécs. 4
Lajos Lesznai: Tri hungaraj pianistoj 5
M. Szilágyi—I. Kádár: La deveno de la hungararo. 6
Károly Jobbágy: Du poemoj. Trad. *T. Ujlaky-Nagy* 9
Recenzo 9
Mozaiko pri Julio Baghy 10
Sándor Kökény: Progreso de la tajpado en Hungario 12
El nia vivo kaj kulturo 13, 29
Eĥo—Reeĥo 14
Pri Sándor Szathmári *(K. K.)* 15
Robert Burns: Tri poemoj. Trad. *Reto Rossetti* 15
Lajos Pusztai: Spertoj de la E-dissendoj de Radio Budapeŝt 16
Márta Nádasdi: La organizita ripozado de la laboruloj 17
Mihály Váci: Rozoj sur la glacio. Trad. *L. Tárkony* 19
P. Balkányi: Vilho Setälä: Fortoj de l' vivo 20
El „Tutmonda Sonoro". Gilgameŝ: La morto de Enkidu. Trad. *K. Kalocsay* 21
Szilárd Bálint: La sekreto de la riĉiĝo 22
P. Balkányi: Andersen en Hungarujo. 23
Lajos Kovács: La bazaltvulkanoj de la Balatonregiono kiel atestantoj 24
István Bencsik: Dunai Vasmű 27
Aladár Puy: La bredado de la hungaraj hundospecoj. Trad. *T. Ujlaky-Nagy* 30
JUNULARO 32
Korespondi deziras 26
Ridetu! Ridu! Ridegu! 22, 23
Irén L. Szász: Stelo sur la ĉielo kaj floro sur la tero 32
Miklós Lett: La historio de Hungario en spegulo de poŝtmarkoj III
Ágnes Lukács: Ilustrajoj 7, 32

Ĉefredaktoro: Ludoviko Kökény
Responda redaktoro: d-ro Jozefo Mátéffy
Redakta Komitato:
Szilárd Bálint, Imre Botos, Lajos Lesznai, Andreo Szabó kaj Tibor Ujlaky-Nagy
Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Kolomano Kalocsay, Sándor Szathmári kaj Lajos Tárkony
Arta ĉefkunlaboranto: Ágnes Lukács
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224—819
Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝt oficejoj, ĉe la gazetkolportistoj, en la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.
La jara abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.-40 poŝtelspezo.
68.64877 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25377



Stefano Barta: Virina figuro. La pentraĵ en 1967 iris en posedaĵon de la Hungara Nacia Galerio. (V. nian artikolon pri S. Barta HV. 1965/4.)

Hungara Esperanto-Asocio plenumis gravan servon por la kulturo de Esperanto, eldoninte tiun ĉi Skizon de historio kaj literaturo de Esperanto. Apartaj ĉapitroj enhavas la vivon de Zamenhof, la unuan jardekon de Esperanto, la evoluon ĝis la unua mondmilito, la novan epokon post la dua mondmilito ktp. Sur 21 paĝoj ni povas studi la historion de la E-movado en Hungario. La plej grandan interesiĝon povas veki la Skizo de Esperanta Literaturhistorio — el plumo de K. Kalocsay, sur 77 paĝoj. Detalaj indeksoj, suplemento kaj bibliografio faciligas la uzeblon de la libro. La redaktoro de la Gvidlibro por Superaj Ekzamenoj, prof. Alfonso Pechan — ankaŭ verkinto de pluraj ĉapitroj — faris tre bonan laboron. Kunlaboris ankoraŭ: P. Balkányi, L. Kökény, d-ro S. Szerdahelyi kaj H. Vatré. Lektoris Emilia Radvánszky. Ĉar tiu ĉi ekzamena materialo, resp. „baza kono por estontaj kaj praktikantaj lingvoistruistoj" estas la unua en sia speco, ĝi povas esperi ankaŭ eksterlandan sukceson. Amplekso: 190 paĝoj, prezo: 20 forintoj. Mendebla ĉe Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, VIII. Kenyérmező utca 2.

FERENC SZILÁGYI
(1895—1967)

La 30-an de Novembro li spektis la televidon, subite ricevis koratakon kaj la 1-an de Decembro mortis en la sveda urbo Boras pro cerba hemoragio d-ro Ferenc Szilágyi, ĉefredaktoro de Norda Prismo, eminenta lingvo-pedagogo, prozverkisto, poeto kaj publicisto, membro de la Esperanto-Akademio, entute unu el la gravaj apostoloj de Esperanto.

Ferenc Szilágyi naskiĝis la 1-an de Februaro 1895 en Budapeŝto. Li finis inter multaj malfaciloj siajn lernejojn, kaj fariĝis jura doktoro. Li eklaboris kiel oficisto, sed tiu ĉi talenta, krome tre praktika homo dum longaj jaroj vegetadis kiel senlaborulo en la tiama Hungario. Tio estis tiutempe la sorto ankaŭ de multaj mil hungaraj intelektuloj.

Kiam en 1934 aperis la volumeto „Dekdu poetoj", Szilágyi en sincera poemo rememoris pri siaj unuaj tri jardekoj, jene:

Mi min devigas al promes':
Konfesi pri la viv'. Nu, jes:
Ne kiel grandbienulido,
Sed nur en tre modesta dom'
Naskiĝis mi, sen festa nom'.
Junaĝe mi ja panon havis,
Eĉ truajn ŝuojn sur pied',
Ludiloj fremdaj min tre ravis,
Mi sonĝis pri velociped',
Sed mia am' — platona restis,
Kaj ankaŭ poste, dum mi estis
Lernanto de la gimnazi',
Mi ĝuis nur en fantazi'.
Nun sekvis zorgoj: kie prenu
Gepatroj monon por la fil'.
Sopiris ĉiuj ni kun mil
Esperoj, ke la Tago venu.
Ĝi venis: mi al patra dom'
Fiere iris kun diplom'.
Nun skize: Mondmilit' kaj fine,
La Paco. Mi: bankoficist'.
La bankoj „ŝparas". Mi: viktime
Paradas sur la „ŝpara list',"
Por vagi en la mondo kriza.
Kaj — ruĝa strek' en vivo griza.
Nun sekvis sango el la pulm'.
Edzino. Par' sub sorta fulm'.
Ne certe eĉ pri seka pano,
Laboron ne serĉante plu,
Ĉar ja domaĝe pri la ŝu',
Sen mono, sen esper', sen sano,
Sen ia ŝanc' de bona nov':
Etburĝo — diras Nekrasov'.



La literaturo, unue la hungara, poste ankaŭ la Esperanta tamen plenigis lian animon de ĝojo kaj konsolo. Kelkajn jarojn li estis ĉefsekretario de la Literatura Societo „Vajda János", kunlaboris al diversaj hungaraj gazetoj.

Kiel kaj kial li fariĝis adepto de Esperanto, li konfesis pri tio en la revuo Hungara Heroldo (1930/5). Laŭ tio: kiam eksplodis la unua mondmilito, Szilágyi kapablis „senti" Esperante. Post dek jaroj, en 1924 „liaj sentoj serĉis konvenan veston por si" kaj tiam li lernis Esperanton. Nur en tiu ĉi, 8-paĝa numero de Hungara Heroldo ni trovis raportetojn pri fervora laborado de Szilágyi. Li fariĝis komitatano de Hungarlanda Esperanto-Societo, aranĝis artvesperon en la Muzikakademio, parolis en Jarkunsido de UEA kaj en la Budapeŝta Grupo de HES, li fariĝis membro de la Lingva Komitato (nun Akademio). Ankaŭ sub du poemetoj ni legas la nomon de Szilágyi, unu el ili estas de Petőfi, la alia estas originalaĵo.

Longajn paĝojn ni devus skribi, se ni volus konigi nur la movadajn, organizajn laborojn de Ferenc Szilágyi. Ekde 1924 — dum jaroj ankaŭ en la Laborista Esperanto-Societo — li laboris multege Li ne estis salajrata oficisto de Esperanto, ankaŭ la kursojn li gvidis preskaŭ ĉiam sen honorario, por la poemoj, artikoloj, eĉ libroj li ricevis nenion. Preskaŭ miraklo estas, kiel li povis vivteni sin kune kun la ĉiam komprenema edzino Rozinjo.

La politika subpremo en la 1930-aj jaroj ĉiam pli sufokis la hungaran popolon. La venenego de la naziismo ĉiam pli forte endanĝerigis Hungarion. En 1932 Szilágyi gvidis kursojn de Esperanto en Svedlando, dum ĉiu jaro dudek kursojn kun ĉ.500 kursanoj, kaj faris 32 prelegojn, ĉefe pri Hungario. Jen homo, kiu ne ricevis eĉ modestan panon en sia patrujo, en sia tuta vivo ne forgesis pri la hejmlando. Ne vane skribis pri li Kalocsay (H. V. 1965/3.): „Efektive Norda Prismo . . . estas ne nur norda, sed ankaŭ hungara prismo, se konsideri, kiom da loko li dediĉas al hungaraj kontribuantoj kaj literaturo."

La plej grava ŝajnas esti en la kariero de Szilágyi la abundeco kaj la varioriĉa agado. La lernolibroj de Szilágyi estas uzataj en multaj landoj, ankaŭ en Sud-Ameriko. Szilágyi restos ĉiam unu el niaj eminentaj verkistoj, poetoj, publicistoj kaj redaktoroj. Ferenc Szilágyi estis ĉefkunlaboranto de Enciklopedio de Esperanto (1935), en „Poemaro el Hungarlando" li prezentis antologieton (1929), poste kunlaboris al „Hungara Antologio" (1933). El liaj originalaj verkoj la plej gravaj estas „Trans la fabeloceano", liaj tri novelaroj kaj la romano „Mistero Minora". Li estas la fondinto kaj ĉefredaktoro de la revuo „Norda Prismo", unu el la plej elstaraj periodaĵoj en tuta historio de Esperanto.

Kiam ni adiaŭas de Ferenc Szilágyi — en nomo de Hungara Vivo kaj de ĉiuj liaj iamaj amikoj kaj kunlaborantoj, ni ripetas pri li trafan tririmon de Lajos Tárkony:

Tralarme sprita streĉo de l'Minora
Mistero. Larĝa vido redaktora.
Transplantoj kun floramo ĝardenista.
Noveloj spicaj. Kaj la koro? Ora.

Ludoviko Kökény

Jenő CSESZKÓ

Hungaraj esperantistoj en Mez-Azio

Post agrabla vojaĝo kvindek unu hungaraj esperantistoj la 28-an de aŭgusto alvenis Moskvon. Inter la Moskvaj esperantistoj, kiuj atendis nin, estis ankaŭ la reprezentantoj de Uzbeka Respubliko, kamaradoj Bag Nazarov kaj Bag Dasarov. (Nia originala plano estis nome viziti la Ilan Uzbekistanan Esperanto-tendaron, sed domaĝe pro neatenditaj naturaj plagoj oni devis ĝin prokrasti.) Post momento nin trovis ankaŭ la reprezentanto de Hungara Ambasado en Moskvo.

La oficialuloj tuj prenis nin en sian protektadon. Helpeme direktis nin ankaŭ la Moskvaj esperantistoj, kiuj bonege parolis Esperanton. Ni okupis lokojn en du, speciale por ni destinitaj aŭtobusoj kaj ni faris rondvojaĝon en Moskvo.

El ni la plimulto estis la unuan fojon en Moskvo. Ni admiris la panoramon de Moskvo de sur la Lenin-monto. Ni vidis la universitaton Lomonosov, la Metron, monaĥejojn, la imponan Kremlon, de ekstere la Maŭzoleon de Lenin. Ĉar tiu ĉi programo ne estis en nia plano, mi demandis la Moskvajn kamaradojn: kiom ni devas pagi por la aŭtobusoj, kiuj jam tutan posttagmezon estis je nia dispono? La respondo estis: neniom. La aŭtobusojn diponigas por ni jam Uzbekistano. Eĉ, se ni volas vidi la vesperan kaj noktan Moskvon, ni povas tion fari, ĉar ĝis nia forveturo ni povas ilin uzi. Post krepuskiĝo, kiam ekvibris la lumoj de Moskvo, ni veturadis laŭlonge de la bulvardoj, stratoj, foje-foje haltis ĉe iluminitaj statuoj, domoj, kaj ni ne povis satiĝi per la vidindaĵoj. Jam pasis noktomezo, kiam ni atingis la stacidomon Kazanskaja. Tie, post kiam ni transprenis niajn valizojn, granda honoro nin trafis. La uzbekaj kamaradoj malfermigis por ni, hungaraj esperantistoj la registaran atendejon. Ni povis primiri kaj ĝui la riĉe ornamitan, luksan salonon, kie televidilo, radio, magnetofono nin distris. Ni povis aŭdi per sonbendoj ĉardaŝon, la marŝon de Rákóczi ktp. En tre bona humoro ni ekveturis al Taŝkento post noktomezo. La Uzbekaj reprezentantoj kaj k-do Makovskij, Moskva esperantisto, estis kun ni ĝis la lasta momento. Kaj ni komencis la pli ol 3 400 kilometran vojaĝon, kiu daŭris dum 72 horoj. La beleco de la pejzaĝo, foje-foje la dezerteco nin preskaŭ gluis al la fenestroj. Kiel ni iom-post-iom forlasis la okcidentan parton de la lando kaj proksimiĝis al la orienta, forrestis la arbozaj, herbozaj plugokampoj. Maloftaj, sed



Samarkand Registan

ampleksaj loĝlokoj. Ĉie grandegaj konstruadoj, pri kiuj la turarganoj, kiel krisignoj, jam de malproksime nin atentigas. Sporadaj arboj, dezerteca pejzaĝo, kie la dombesto estas nur la senpretenda azeno. Poste ankaŭ tiuj forrestas kaj anstataŭas ilin la eĉ malpli pretendaj kameloj. Ofte preteras nian vagonaron la karakterizaj mahometanaj vilaĝoj, kun apenaŭ du metrojn altaj, senfenestraj, plattegmentaj argildomoj. Ĉirkaŭ ili estas kelkaj kameloj, multaj infanoj, sed ne eĉ unu arbo.

Sed ŝanĝiĝas la bildo, kaj jen alproksimiĝas granda urbo kun multaj fabrikoj. En ĝi modernaj domoj, bonegaj asfaltitaj ŝoseoj, parkoj. La kontrasto frapas nin draste. Kaj tion ni spertas dum traveturo de kelkaj kilometroj. Sur tiaj lokoj, kie — ni pensas — eĉ herbero ne povas vegeti, ĉe la stacidomo la uzbekaj loĝantoj, vestitaj en buntaj roboj atendas la vagonaron kun amaso da grandaj longecaj sukermelonoj. Dum kelkaj minutoj, dum la vagonaro haltas, formiĝas originala orienta foiro. Ni kuradas tien kaj reen, marĉandas, ĉar estas inde. Kaj fine ni ĉiuj premadas inter la brakoj grandajn dolĉaromajn sukermelonojn. Ni ĝuegas la neniam viditan bildon. Klakadas la fotoaparatoj. Tiel ni alvenis post plena, tri tagnokta veturado al Taŝkento. Ĉi tie la tempodiferenco estas jam kvin horoj kompare al Budapeŝto.

Estas frumatene, 30 minutoj post la kvina, laŭ loka tempo. Nin atendis akceptokomisiono de la Uzbeka Amikeca Asocio, kun la gvido de k-do Bokov kaj la grupo de Uzbekaj esperantistoj kun la gvido de k-do Poliŝĉuk, pri kiuj ni tuj konstatis, ke ili bonege parolas Esperanton.

K-do Poliŝĉuk komunikis al ni, ke oni kunmetis por ni unu-semajnan programon por prezenti al ni la vivon de la Uzbeka Respubliko kaj dum tiu semajno ni estos gastoj de la Respubliko. Nin surprizis la sciigo kaj ege ĝojigis. Oni loĝigis nin en la luksa hotelo „Rosija", kie ni ĉiuj ricevis tute komfortajn apartamentojn. Venis en la hotelon la Prezidantino de la Amikeca Asocio, k-dino Ŝukorova, ĉarma uzbeka virino, kiu estis efektive nia dommastrino. Ŝi petis nin, ke ni bone rigardu ĉion kaj deziris, ke ni fartu bone en Uzbekistano. Tuj post la aranĝo de niaj oficialaj aferoj ktp., aŭtobusoj portis nin al urborigardo. Ni povis vidi ankoraŭ la signojn de la granda tertremo. Iuloke ankoraŭ oni metis la ruinojn per ekskavatoroj sur kamionojn kaj purigis la lokojn de iamaj, ĉefe argilaj domoj. Streĉa, vigla laboro ĉie en la urbo. La modernaj, bone konstruitaj domoj apenaŭ suferis de la tertremo. Kelkaj fendiĝoj, ripareblaj deformiĝoj estis videblaj. Kion ni vidis en la rekonstruado de Taŝkento, tio superas ĉian imagon! Ĉie en la urbo, sed precipe en la ĉirkaŭaĵo de la urbo nenombreble multaj konstrulokoj. Tutaj stratoj, kvartaloj, kvazaŭ nova Taŝkento konstruiĝas. Jam de malproksime signas tion la miloj de arganoj. Je nia demando, kiel povas finance solvi Taŝkento tiun grandiozan konstruadon, oni rakontis al ni, ke tuta Sovetunio helpas la urbon. Tutajn kvartalojn, stratojn entreprenis konstrui la diversaj respublikoj kaj urboj de Sovetunio, sed tiel, ke ankaŭ pri la materialoj, maŝinoj, laboristoj, monrimedoj ili zorgas.

Ni vizitis la fabrikon „Uzbekfilm", kie oni aranĝis al ni prezentadon el la plej novaj produktaĵoj. — Nia unua renkontiĝo kun la taŝkentaj loĝantoj, laboristoj okazis en la kultursalonego de la loka Tekstilkombinato, en kiu laboras 20 000 gelaboristoj. Jam surstrate, antaŭ la kulturdomo amaso da homoj nin atendis aplaŭdante kaj salutante. Inter iliaj vicoj ni — hungaraj esperantistoj — iris en la salonegon. Sekvis solenaj salutoj kaj paroladoj flanke de la Partio, de Komsomol, de la sindikato de la fabriko. Poste nacia popolensemblo aranĝis kulturprogramon je nia honoro.

Ni havis okazon vidi dum tuttaga

ekskurso la novan socialistan urbon *Almalik*, kun sia kuproercminejo kaj kuprokombinato. Ni vidis tute modernan, surfacan minejon de kuproerco, kie ĉio estas altnivele aŭtomatigita, kaj oni faras nenian pezan laboron per homa forto.

En la tre moderna kulturdomo de la kombinato oni aranĝis kulturprogramon je nia honoro. Estis agrable vidi sur la fasado de la kulturdomo la hungaran nacian flagon. La megafonoj disaŭdigis en la parko de la kulturdomo hungarajn popolkantojn kaj dancmuzikon. — En Taŝkento ni povis studi la konstantan ekspozicion de popolmastrumado de Uzbekistano, kiu profunde efikis nin.

Ĉie dum nia veturado ni povis vidi sur la kampoj la diligentan laboron de la popolo. Ĉie troviĝas bone flegitaj kotonkampoj, ĝardene kulturitaj, irigaciitaj pejzaĝoj, vinberejoj, fruktoĝardenoj. La blanka oro de Uzbekistano jam maturiĝas. Riĉan rikolton ĝi promesas. Fendiĝas jam la juglandograndaj burĝonoj kaj elmontras sian blankan enhavon. La sporadajn maturajn burĝonojn oni permane kolektas, sed jam prete atendas la kotonkombajnoj la plenan rikolton. Super la kotonkampoj jam krozas la aeroplanoj kaj aspergas la plantaĵon per kemiaĵoj, kio rezultigas, ke la plantoj post kelkaj tagoj faligos siajn foliojn kaj tiel liberiĝas la vojo por la maŝina rikolto. Por ni rava spektaklo.

En distanco de 35 km. de Taŝkento la hungaraj esperantistoj vizitis la kotonproduktan kolhozon „Sverdlov". En la centro de la kolhozo inter arboj estis strećita blanka tolo kun la surskribo: „Huŝ kelipsis" — „Bonvenon". Kaj en la kulturdomo de la kolhozo baldaŭ ni partoprenis festan kunvenon, kie ni prezentis kulturprogrameton. Ĉie ni parolis antaŭ la publiko Esperante. La tradukon faris niaj Uzbekaj esperantistoj. Poste la prezidanto invitis nin por regalo. Kiam la bonhumoro jam leviĝis al certa grado pro la bongustaj trinkaĵoj, alvenis kolhozknabinoj vestitaj en popolkostumoj kaj komenciĝis la dancado. Niaj junuloj rapide lernis la popoldancojn kaj miksiĝinte kun la kolhozanoj, ili vigle dancis.

Oni honorigis la hungarajn esperantistojn ankaŭ per tio, ke ekde la komenco de nia peraŭtobusa veturado, la Taŝkenta milico donis al ni eskorton. Iu juna, kara milicano, leŭtenanto veturis antaŭ nia aŭtobuskolono kaj certigis al ni liberan vojon. Li ornamis la kromĉaron de sia motociklo per hungara kaj Esperanta flagetoj kaj per laŭtaj signaloj donis averton pri nia veno. Ni profunde interamikiĝis kun li.

La unua periodo de nia gastado finiĝis. Sekva celo estis la praurbo, *Samarkando*, kiu stiuas 350 km. sude de Taŝkento. Je la naŭa matene ni okupas niajn lokojn en la aŭtobusoj. Ni ŝvitas kaj malpaciencas. En ombro estas almenaŭ 40 Celsiusaj gradoj. Fine ni povas ekveturi. Kiam nia k-do Poliŝĉuk informas nin, ke ni veturos la vojon, sur kiu ankoraŭ malmultaj gastoj veturis, nia scivolemo strećiĝis. Kaj vere nia vojo estis interesega. Ni povis vidi la gigantan, naturotransformigan laboron de Soveta Uzbekistano. Malproksimiĝante de Taŝkent, pli kaj pli forrestas la bone flegitaj kampoj, kaj kiam ni forlasas la riveron Sir-Darja, dezertiĝas la ĉirkaŭaĵo. Homo kaj besto jam de malproksime evitas ĉi regionon. Nia vojo trapasas la t. n. *Malsatstepon*. Nenie estas eĉ signo de la vivo. La varmeco estas sufoka. Ĉe la horizonto ni vidus kvazaŭ riverojn. Sed nun la fatamorgano ludas kun ni en la arda dezerto. Tamen dekstre kaj maldekstre vidiĝas ia vivo ! Tio jam ne estas fatamorgano. Vere, homoj, maŝinoj svarmas en la dezerto. Terskrapiloj glatigas la terenon, la brakoj de ekskavatoroj moviĝas, fosas kanalojn. Sur nemezureblaj terenoj jam estas preta la giganta reto de surfacaj akvokondukiloj el betono. Fore eĉ jam akvo brilas en ili. Verdiĝas la ĉirkaŭaĵo. Ni vidas provizoran argilkabanan vilaĝon. En ĝi homoj, la konkerantoj de la Malsatstepo. Iom ene ni jam vidas konstruiĝantajn murojn, turarganojn. Oni konstruas la loĝejojn de sovhozo. En aliajn oni jam transloĝiĝis kaj restis orfaj la provizoraj argilkabanoj. Melono, vinbero, fruktoj, kotono sur la Malsatstepo ! Al la nova stacidomo aro da kamionoj portas la produktaĵojn de la floranta stepo. Longaj vagonaroj atentas la ordonon por ekveturo. Pli kaj pli enpenetrante ĉi tiun regionon, kvazaŭ filmo ruliĝas antaŭ niaj okuloj la transformiĝo. Ni devojiĝas kaj inter fruktoĝardenoj, vinberejoj, graciaj familiaj domoj atingas la centron de sovhozo „Pahtakoe" (kotonrikoltanto). Sovetan kaj hungaran standardojn flirtas la vento sur la kulturdomo. Blovorkestro muzikas. Centoj da sovhozanoj en bunte koloraj vestoj nin atendas. Ruĝaĉapaj pionirknaboj, knabinoj kun florbukedoj nin salutas. Antaŭ la abunda tagmanĝo nin salutis la partia sekretario de la regiono, la direktoro de la sovhozo. Ili alvokis la atenton pri la tabloj riĉe ŝarĝitaj de la produktaĵoj de la sovhozo. Mirinde ĉar nur antaŭ kvin jaroj ili deprenis la ĉirkaŭaĵon disde la dezerto. La unuaj maŝinoj kaj homoj aperis ĉi tie nur en 1962. La rezulto estas vere admirinda.

Adiaŭinte de la sovhozo jam pli rapide ŝanĝiĝas la pejzaĝo. Komence sekvas nur montetoj, sed baldaŭ ni atingas la montaron *Than-Shaj*, kies senarbaj lokoj atingas la 3000 metran altecon. Veturante inter tiuj lokoj ni baldaŭ atingis la pordegon de *Timur*. Ĝi estas vastiĝanta valo, kie ŝoseo, rivereto kaj ankaŭ fervojo trapasas. Ni proksimiĝas al Samarkando. Denove ni veturas inter bone kulturitaj kampoj, sovhozoj. Ĝardeniĝas la pejzaĝo. Nia veturado tra tiu ĉi teritorio estis neniam forgesebla travivaĵo.

Post 350 kilometra veturo ni agrable ripozis en la bonega hotelo „Registan". Tuj la postan tagon ni traveturis la urbon. En la periferio ni vizitis restaĵojn de historia, arta arkitekturo. La observatorion de Ulug-Bek, Kazica de Fumi, la mahometanan tombejon Sah-i Zinda, la kolosan ruinaĵon de la moskeo Bibi-Hanum, kiun oni konstruis je la honoro de la senindulga Hano Timur, pri kiu en Uzbekistano estas konataj pli ol mil legendoj, la faman palacon „Registan", kiu estis la centro de la mezepoka Samarkando kaj kie estas la belegaj Medresoj (mahometanaj altlernejoj), la kreaĵon de la mezepoka, islama arkitekturo, la maŭzoleon Gur-Emir, kie Timur kaj lia filo kaj aliaj Timuridoj ripozas. Estas belegaj tiuj ĉi artaĵoj.

Oni enprogramigis por la hungaraj esperantistoj ankaŭ la viziton de la Samarkanda silkfabriko, kie el la 3200 laboristoj 2850 estas virinoj. Ni trairis la teksejojn. Modernaj maŝinoj el la Germana Demokratia Respubliko. Belegaj produktaĵoj el originala silko kaj plastaj fadenoj. La spektaklo ravis precipe la virinojn.

Uzbekistano krom la kotono havas ankaŭ alian oran valuton, la *karakulŝafon*. Ni vizitis la Sciencan Esplorinstituton de la Karakulŝafoj, unikan en la tuta mondo. Oni rakontis al ni, ke la karakulŝafo nur tie fartas bone, kie la mizera vegetaĵo devigas ĝin vagadi almenaŭ tage 40 km-ojn, por paŝte satiĝi.

Ĉi-tage ni havis ankoraŭ unu fabrikviziton. Ni iris en la Samarkandan *Teofabrikon*. Ĝi aspektas prefere al sanatorio. Ankaŭ ĉi tie nin akceptis orkestro en la dekorita fabriko. La saĝaj maŝinoj pakas la teojn por enkaj eksterlando en 50 gramajn paketojn. La maŝinoj mem faras ankaŭ la skatoletojn.

Ankaŭ nia Samarkanda programo finiĝis. En eventoj, spertoj ni multe gajnis en tiu ĉi fora praurbo.

Ni vojaĝis reen al *Taŝkento*. En la restoracio de „Rosija" nin atendis la lasta tagmanĝo en Uzbekistano.

Alvenis la malfacilaj minutoj de adiaŭo. K-dino Ŝukorova kun kelkaj anoj de la estraro de la Amikeca Asocio estis inter ni. Ŝi salutis nin, kaj dankis, ke ni venis el tia fora lando. Ŝi esprimis sian konvinkon, ke ni fartis bone en Uzbekistano, kaj ke ni povis vidi, kiel vivas kaj laboras la diligenta uzbeka popolo, kaj kion ili faros en la estonto. Sed tio kondiĉas la gardon de la paco. Varme mi dankis en la nomo de la hungaraj esperantistoj la gastigadon. La programo, kiun la uzbekaj amikoj kunmetis por ni, estis riĉa, multtavola kaj instrua. Ni multe lernis kaj havos hejme okazon multe paroli pri ĝi.

Kun ĉ. 12 000 kilometra vojaĝo la hungaraj esperantistoj alvenis en Budapeŝto kun multaj belaj memoraĵoj. Ni vere ĝojas, ke de proksime ni konatiĝis kun la vere ĉarma kaj diligenta uzbeka popolo. Ni vojaĝis sub la devizo: „*Honore al la 50-jara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio*". Kaj ni aldonas ankoraŭ: „*Honoron al la brava, simpatia uzbeka popolo!*"

László TISZAI:

LA 600-JARA UNIVERSITATO DE PÉCS

Antaŭ ses jarcentoj la hungara reĝo Ludoviko la Unua petis de la papo en Romo, ke li aprobu la fondon de universitato, „studium generale" en urbo Pécs. Papo Urbano la Va baldaŭ, dumvoje al Romo en Viterbo — kiu tiam apartenis al la Eklezia Ŝtato —, la 1-an de septembro 1367 subskribis ĉarton, en kiu li aprobis la fondon de la universitato. La arkivo de Vatikano eĉ hodiaŭ gardas tiun ĉi buleon, sed la ĉarto de la reĝo kaj ankaŭ lia letero al la papo bedaŭrinde malaperis.

La universitato de Pécs apartenis al tiu grupo de „studium generale", kiuj estiĝis en la sesdekaj jaroj de la 14-a jc.: en Krakovo en 1364, en Vieno en 1365 kaj en Pécs en 1367. Ĉiuj tri universitatoj estis fonditaj dum la regado de la sama papo, Urbano la Va. Finfine ĉiuj tri universitatoj restis mankhavaj. Pro eksplicita rezervo de la papo mankis tiu fakultato, kiu en tiu tempo estis taksita la plej grava, nome la teologia fakultato. Tiun ĉi fakton kelkaj esploristoj klarigas tiel, ke la papo estis franca kaj lin ligis fortaj fadenoj al la Pariza Universitato Sorbonne, kaj la papo volis garantii privilegion al tiu, kiam li malpermesis la instruon de teologio en la pli novaj universitatoj.

Tial la „Universitas Quinqueecclesiensis" (latina nomo de Pécs pri la tiam ekzistantaj kvin preĝejoj) estis malfermita nur kun jurscienca kaj filozofia fakultatoj. Pri la profesoroj kaj studentoj restis nur malmultaj indikoj. Plej multon ni scias pri la fama itala profesoro Galvano de Bologna. Li estis ankaŭ la jura konsilisto de la universitata kanceliero, de episkopo Vilhelmo.

Ede Petrovich, esploristo pri la mezepoka universitato, baze de kelkaj indikoj supozas, ke en Pécs estis instruataj ankaŭ medicinaj sciencoj. Inter la mezepokaj arkeologiaj memoraĵoj li ja trovis historieton, kiu raportas pri tio, ke en la universitato du studentoj diskutadis kaj fine interbatadis. Unu vundigis la alian per iu akra ilo, kaj la tien amasiĝintaj studentoj donis diversajn konsilojn por kuraci la vunditon. Ĝuste pro tiuj konsiloj supozis kelkaj personoj, ke la studentoj estis spertaj en la medicino.

Rilate la unuan hungaran universitaton estas ankoraŭ granda obskuro, ĉar dum la tempestaj jarcentoj preskaŭ ĉiuj skribaj memoraĵoj perdiĝis. Ekz. ni ne scias precize eĉ tion, kie estis la domo de la universitato. Ŝajnas esti plej probable, ke ĝi staris sur la loko de la nuntempa kanonika arkivo, kaj en mezepokdevena konstruaĵo, kiun oni malkonstruis en 1780, estis la „Alma Mater".

En la feŭdala anarkio, disvastiĝanta post la morto de Ludoviko la I-a (1382) kaj dum la regado de Sigismundo (1387—1437) la signifo de la universitato malgrandiĝis. Oni ne scias, ĝis kiam vivis la universitato de Pécs kiel „studium generale" kaj kiam ĝi transformiĝis „Maior Schola" (mezlernejo). Krom la internaj kaŭzoj ekzistis ankaŭ eksteraj cirkonstancoj, ĉefe la ĉiam pli proksimiĝanta turka danĝero. La plej lasta fidinda indiko datiĝas el 1402, kiam estas menciita kiel studento de la universitato, Lukaso, filo de Ladislao.



La konstruaĵo de la kanonika arkivo

La fondiĝo de la universitato de Pécs antaŭ 600 jaroj atestas, ke nia lando jam tiam atingis altan gradon de la kulturo. Pro ĝia kreo kaj iama famo ni rajte povas esti fieraj, ĉar per ĝia fondiĝo naskiĝis la hungara supergrada instruado.

Ekde 1923 Pécs denove havas universitaton. Tiam ekfunkciis ĝia Scienca Universitato, kiu nun havas nur juran fakultaton, ĉar la medicina fakultato en 1953 fariĝis memstara universitato.

La Medicina Universitato de Pécs estas unu el la centroj de la hungara medicina esplorlaboro. Ĉi tie



La moderna kliniko de la Medicina Universitato

Ĵa funkcias la ununura biofizika katedro en Hungario. La katedrojn de la universitato gvidas internacie famaj, Kossuth-premiitaj sciencistoj.

Nun konstruiĝas en Pécs la nova universitata kvartalo. Jam funkcias la grandioza, 400-lita kliniko, plej bela kliniko de Mez-Eŭropo. Ĝis 1970 estos preta ankaŭ la moderna kolegio por 400 studentoj.

La loĝantoj de urbo Pécs per intimaj festoj rememoris pri la sescent-jara jubileo de la universitato kaj samtempe de la hungara supera instruado. Tiujn ĉi festojn anime partoprenis ĉiuj amikoj de la ĉarma sudhungarlanda urbo Pécs, kaj homoj, kiuj ĝojas pri ĉiu grava evento de la kulturo, kie ajn ĝi okazu.

TRI HUNGARAJ PIANISTOJ

Estas homoj, kiuj opinias, ke la muzikaj konkursoj ne servas la veran kaj valoran muzikkulturon. Aliaj diras, ke ĝuste la muzikaj konkursoj estas bonaj rimedoj por ekkoni la eksterordinarajn muzikajn talentojn.

Ni pensas: la vero troviĝas en la mezo — en multaj okazoj eminentaj muziktalentoj aperis kiel rezulto de muzikaj konkursoj; kontraŭe ekzistas vere altnivelaj pianistoj, violinistoj ktp., kiuj ne sukcesus atingi bonajn rezultojn en konkursoj.

La tri plej konataj kaj plej talentaj hungaraj pianistoj, pri kiuj mi skribos sube, pruvas la opinion, kiun mi menciis plej unue: ĉiuj tri altiris la atenton de la muzikaj fakuloj dum muzikaj konkursoj.

Unu el la plej fruaj muzikaj konkursoj de la 20-a jarcento estis aranĝita en Budapest, ĉefurbo de Hungario, en 1933. Budapest estis jam tiutempe mondfama kaj

konata centro de koncertoj, tiu de la prezentadoj de la mondkonataj muzikartistoj de la mondo.

Dum tiu ĉi konkurso, kiu estis dediĉata al la arto kaj al la verkoj de Ferenc *Liszt*, juna hungara knabino atingis grandan sukceson per prezentado de komponaĵoj de Liszt, precipe de la granda pianokoncerto en Es-maĵora; *Annie Fischer* estis ŝia nomo. Ŝi gajnis la unuan premion kaj post nelonge ŝia nomo fariĝis konata ĉie kie troviĝis muzikamantoj, kiuj volis aŭdi valoran muzikon, valoran prezentanton.

Annie Fischer vizitis de tiu tempo la tutan mondon, kaj ĉie ŝi akiris honoron por Hungario kaj ĝia muzikkulturo. La lernantino de Arnold *Székely* kaj Ernő *Dohnányi* ankaŭ nuntempe estas nomata unu el la plej aŭtentikaj interpretantoj de la verkoj de Schumann kaj Liszt.

Dum la sama konkurso, kie Annie Fischer estis la plej unua, alia juna hungara pianisto ricevis premion kaj atingis bonvolan atenton. Lajos *Hernádi* fariĝis



ankaŭ post ne longa tempo konata pianisto kaj havis eblon pianludi en la plej foraj landoj kaj urboj de la mondo. Li estis disĉiplo de Béla *Bartók* kaj Ernő *Dohnányi*, sed poste en Berlin ankaŭ de Arthur *Schnabel*. — Lajos Hernádi estas de post la liberigo de Hungario, ekde 1945 profesoro de la Muzika Altlernejo de Budapest. Lian efikan instruadon pruvas la fakto, ke multaj el liaj lernantoj gajnis premiojn en internaciaj muzikaj piano-konkursoj. Li estas aŭtoro de multaj muzikfakaj artikoloj kaj eldoninto de grandnombraj pedagogaj verkoj.

Ankaŭ la artista kariero de Imre *Ungár* komenciĝis dum internacia muzika konkurso. En 1932 en Varsovio je la fino du pianistoj atingis la necesan nombron de punktoj por esti unuaj

premiitoj: la hungaro Imre *Ungár* kaj la soveta Aleksandr *Unjinskij*. La komisiono tiam decidis doni du unuajn premiojn en tiu ĉi konkurso. La hungara pianisto do ricevis la unuan premion.

Jam tre frue, en sia aĝo de tri jaroj Imre Ungár perdis sian vidkapablon; depost tiu tempo li estas blinda. Sed jam la Varsovia konkurso montris, ke el arta vidpunkto li atingas la nivelon de la vidantaj pianistoj. Kaj tiel estas eĉ hodiaŭ.

Li estas bona esperantisto. Mia opinie ne tre ofte okazas, ke mondfama pianisto estu tiel fervora, arda kaj entuziasma adepto de Esperanto, kiel Imre Ungár Jen plia kaŭzo, ke ni alte taksu ne nur lian arton, sed ankaŭ lian homan sintenon kaj kvalitojn kiel samideano.

La Hungara Popola Respubliko taksas alte la artan kaj samtempe politikan rolon de siaj artistoj. La menciitaj tri pianistoj ricevis multajn distingojn, inter ili la plej altan ordenon de la hungara ŝtato — la Kossuth-premion. Tio montras, ke ilia laboro, ilia arto plifortigas ne sole nian ŝtaton, sed ankaŭ ĝian humanisman celon: la pacon por la tuta homaro.

Lajos LESZNAI

Miklós SZILÁGYI—Imre KÂDÁR

LA DEVENO DE LA HUNGARARO

Estas okulfrape por ĉiu, kiu parolas iun Eŭropan lingvon, ke la hungara malsimilas la germanan, slavan kaj la rumanan lingvojn. La sistemo de ĝia konjugacio kaj deklinacio havas alian karakteron, ĝi ne uzas prepoziciojn por esprimi adverbajn rilatojn, ne konas la genron. Estas do facile fari la konkludon, ke la hungara lingvo ne havas parencojn en Eŭropo, almenaŭ inter la lingvoj, kiuj apartenas al iu el la plej grandaj lingvofamilioj kiel la slava, ĝermana, romana. Prezentiĝas do la demando: kie vivas la parencaj popoloj de la hungararo?

Kiam la prauloj de la hungaroj aperis en la 9a kaj 10a jarcentoj en la orienta duono de Eŭropo kaj per militiroj tenis en konstanta timo la popolojn vivantajn en la najbaraj teritorioj, ili estis konsideritaj, kiel idoj de la hunoj. La hunoj vivis nome ĉi tie en la Kárpát-baseno kelkajn jarcentojn pli frue kaj havis same bataleman karakteron, kiel la hungaroj. Por pruvi la parencecon de tiuj ĉi du popoloj, la samtempuloj en siaj kronikoj aludis al la batalemo, sama vivmaniero de ambaŭ popoloj. Kaj tiu opinio tenis sin dum jarcentoj. En la jaro 1770 aperis lingvistika studo de *János Sajnovics* (Janoŝ Ŝajnoviĉ), en kiu la aŭtoro deklaris sian tute novan opinion. Li pruvis, ke la hungaroj estas la parencoj de la laponoj kaj finnoj (popoloj vivantaj sur la Skandinava duoninsulo). De tiu tempo pli kaj pli da fakuloj akcentis la parencecon de la lingvoj hungara, finna, vogula, ostjaka, estona, lapona ktp. Ĉi tiu parenceco signifas ankaŭ tion, ke la hungara lingvo en la frua periodo de sia historia evoluo estis identa kun ĉi tiuj lingvoj.

La parenceco de la lingvoj ĝenerale signifas ankaŭ la parencan interrilaton de la koncernaj popoloj. Do kiam ni parolas pri la deveno de iu popolo, tiam ni sekvas la historion de la lingvo. La vortoj de la lingvo gardas ja la memorajojn de la pasintaj eraoj eĉ tiam, se ne ekzistas alia memorajo postrestinta el la sama epoko.

Kiamaniere konstatas la kompara lingvistiko la parencecon de la lingvoj? La lingvistiko esploras, komparas la vortojn kaj gramatikajn elemen-

tojn (finaĵojn, derivilojn), la manieron de la frazkonstruado en la diversaj lingvoj, kaj malkaŝas certajn similecojn. Kompreneble la simileco ne pruvas ankoraŭ unusence la parencecon. Okazas kelkfoje, ke vortoj ne havantaj historian interrilaton sonas same. Sed ankaŭ la similformaj vortoj pruvas parencan rilaton nur en tiu kazo, se ankaŭ iliaj signifoj estas identaj, kaj indikas konceptojn, kiujn povis koni ambaŭ popoloj jam antaŭ jarmiloj. El tiu vidpunkto komparante la hungaran kun la ceteraj finn-ugraj lingvoj rezultiĝas, ke la nombro de niaj vortoj devenintaj el la finn-ugra lingvo estas proksimume 1000. Tio ŝajnas esti sensignifa, sed la nombro multobliĝas, se ni aldonas la tiel nomatajn deven-vortojn estiĝintajn per kunmetado aŭ vortformado, kaj ni ekscias, ke granda parto de la deriviloj devenas el la finn-ugra lingvo.

Parto el ora trovaĵo el la patrujokupado

La lingvistikaj rezultoj klare asertas finn-ugran devenon. Sed estas demando: ĉu la historio de la popolo kaj tiu de la lingvo estas identigeblaj? Okazis ja, ke iu popolo devigas sian lingvon al alia subjugita popolo, aŭ la subjugitoj transprenis la lingvon de la konkerintoj kaj tiamaniere la originala lingvo de la konkerita popolo malaperis. Ĉu ne povis okazi io simila ankaŭ ĉe la hungararo? Laŭ nia nuntempa kono, — ne. Ni povas sekvi la historion de la hungararo de la deveno ĝis ĝia nuna definitiva enloĝiĝo kaj la scienco ne trovis spuron de lingvomiksiĝo dum la historia evoluo.

Ni ekzamenu kronologie kie kaj kiel vivis antaŭ jarmiloj tiu komunan lingvon parolinta finn-ugra popolo, pri kio ĝi okupiĝis, kaj kiel ĝi dissutiĝis en la diversajn partojn de Eŭropo.



La migrado de la hungaroj

Tiu parto de la vorttrezoro, kiu pruvas komunan devenon, kroĉiĝas al la plej elementaj agadoj, okupoj. Estas do demando: kiaj estis ĉi tiuj okupoj koncerne la praan finn-ugran popolon, t. e. kian vivmanieron havis la prauloj de la hungaroj. La prahistoria scienco trovis karakteriza la fiŝkaptadon, ĉasadon kaj la kolektadon de la vegetaĵoj. Tiuj okupoj ne estas produktivaj. Kontraŭe apenaŭ kelke da vortoj devenantaj el la finn-ugra lingvo aludas je la komenciĝo de la produktantaj okupoj: terkulturado kaj bestbredado. Ĉi tiu fakto signifas, ke la prauloj de la hungararo staris sur la plej malalta grado de la historia evoluo kiam ili kunvivis kun la ceteraj finn-ugraj popoloj. Ni aldonu, ke la plej proksimaj parencoj de la hungaroj, la voguloj kaj ostjakoj ĝis la fino de la pasinta jarcento ne superis multe ĉi tiun malaltan nivelon de la evoluo.

Sed la primitiva nivelo tute ne signifas, ke tiuj prapopoloj ne estus havintaj teknikajn konojn, opinion pri la mondo ilin ĉirkaŭanta. Ili faris ilojn metotajn tra la riveroj kaj lagoj, kiuj baris la vojon de la migrantaj fiŝoj, kiujn ili povis tiamaniere relative facile ekposedi. La ĉasistoj jam tiutempe konis ian primitivan formon de la arko kaj sago. Koncerne ilian percepton pri la mondo: homo staranta sur primitiva grado estimas kiel dion la elementojn de la naturo, la pli grandajn, pli potencajn estaĵojn, la fortajn grandegajn sovaĝbestojn. Konvenaj vortesprimoj troviĝas pri tiuj objektoj, nocioj ankaŭ en la pralingvo.

La kondiĉo de la fiŝkaptado, ĉasado kaj kreskaĵkolektado estas la riĉeco kaj diversflankeco de la naturo. La finn-ugra popolo devis vivi sur regiono, kie staris je ilia dispono sufiĉe da vegetaĵo kaj bestoj. Kie ekzistis tiu teritorio? Por ĉirkaŭlimi la iaman loĝlokon de la finn-ugra popolo, denove ni devas uzi la rezultojn de la lingvistiko. La lingvistiko ekiras el la tezo, ke la bestaro kaj vegetaĵaro de iu regiono ne ŝanĝiĝis grave de post la apero de la homo sur la tero, kaj en la zonoj modera, glacia aŭ tropika pli-malpli ankaŭ nun vegetas tiuj kreskaĵoj kaj multobliĝas tiu bestaro, kiuj antaŭ jarmiloj. Do se la nomo de iu kreskaĵo aŭ besto estas samdevena, kaj ni scias ankaŭ la regionon, kie tiu kreskaĵo aŭ besto estas hejmeca, tiam ni povas larĝlinie ĉirkaŭlimi la originalan loĝlokon de la prapopolo. La lingvistoj uzintaj tiun metodon konstatis, — priatente la opinion ankaŭ de la biologoj — ke la prapatrujo de la finn-ugroj povis esti en la regiono de la riveroj KAMA kaj BJELALA, okcidente de la URAL-montaro.

La popolkoncentriĝo estis kompreneble tre maldensa, la finn-ugra prapopolo estis vivanta sur granda teritorio disŝutite. Sekvas el tio, ke la pralingvo jam en la komenca tempo ne estis unueca, certaj dialektaj dife-

rencoj estis en la lingvo de la grupoj vivantaj malproksime unu de la aliaj, kaj tiuj dialektaj diferencoj kun la tempo pli kaj pli forte profundiĝis.

La hungararo plej longan tempon vivis en proksima rilato kun la voguloj kaj ostjakoj. La prauloj de ĉi tiuj tri popoloj translokiĝis ĉiam pli kaj pli orienten ĝis la suda, milda deklivo de la Ural-montaro. Sed ili ne transiris la montaron. La voguloj kaj ostjakoj nur en la postaj tempoj translokiĝis sur iliajn hodiaŭajn loĝlokojn, en la regionon de la riveroj Ob kaj Jenisej. El inter la tri popoloj la loĝloko de la hungaroj estis plej sude. Baldaŭ aperis la konsekvencoj de tiu suda situo: la prahungaroj interligiĝis ĉiam pli kaj pli strikte kun la popoloj vivintaj sur najbaraj teritorioj kaj parolintaj alian lingvon.

Tiutempe — proks. 500 jarojn antaŭ nia erao — sur la regiono de la suda Uralo, sur la herbkovrita zono vivis turkdevenaj popoloj, kiuj jam elformis evoluintan brutbredadon. Ili konis la bredadon de la bovoj, ŝafoj kaj ĉevaloj. Ilian bestbredadon karakterizis, ke post eluzo de la paŝtejoj, ili pluen peletis la bestaron kaj havigis pli novan paŝtejon. Kompreneble estis granda konkuro por la ĉiam novaj paŝtejoj. La diversaj gentoj preskaŭ senĉese staris unu kontraŭ la alia. La brutbredado, kiel okupo neeviteble kuntiris la fortiĝon de la batalorganizaj formoj, la pliperfektiĝon de la milittekniko kaj taktiko.

La prahungaroj strikte interligiĝinte kun tiuj popoloj, ekkonis la brutbredadon, kaj dum kelkaj jarcentoj aliformiĝis ilia tuta vivmaniero. La hungararo ekde tiu tempo dum longaj jarcentoj vivis kun la batalemaj brutbredantaj popoloj. Inter ili, apud la turkdevenaj grupoj, estis ankaŭ irandevenaj popoloj. La lingvo fidele gardas la memoraĵojn ankaŭ de tiu ĉi strikta kunligo, ja multnombraj fakesprimoj de la bredado estas devenintaj el la turka kaj irana lingvoj. Okaze de la kontakto la hungararo daŭrigis viglan komercadon kun la popoloj vivantaj en sia najbareco, ekkonis kelkajn industribranĉojn (pretigado de teksaĵo, prilaboro de metaloj), ekkonis la praktikon de la terkulturado.

Al la sukcesaj bataloj de la bredistaj popoloj, por defendi la akiritan paŝtejon, respektive por akiri novan paŝtterenon, ne sufiĉis la milita forto de unusola gento. Tial la najbaraj gentoj unuiĝis, ligis gentofederacion. Ankaŭ la prauloj de la hungaroj vivis longtempe en gentofederacio kun turkdevenaj popoloj. Ties konsekvenco estis, ke kiam la hungaroj aperis en Eŭropo, ili estis konsideritaj kiel idoj de la hunoj, same parolantaj la turkan lingvon. Plua konsekvenco: turkdevenaj estas en la hungara lingvo multnombraj dignonomoj, vortoj esprimantaj rangon, titolon. Turkdevena dignonomo estas ekzemple: „Gyula", postrestinta kiel urbonomo. La strikta interrilato kun la turkaj popoloj klarigas, ke oni nomas la hungarojn en la eŭropaj lingvoj „vengri, ungar, hungarus", kvankam ĉi tiuj vortoj ne koncernas la originalan nomon de la hungararo. Tiuj nomoj devenas el nomo de iu turka gentofederacio „onogur".

Ĉirkaŭ la komenciĝo de nia erao en Azio kaj Eŭropo, de oriento al okcidento okazis vasta popolmoviĝo, kiu daŭris en ĉiam novaj ondoj pli ol jarmilon. Tiu popolmoviĝo, popolmigrado eksigis la hungararon de sur ĝia originala loĝloko. Kaj ekde tiu tempo jen sin defendante, jen atakante por pli novaj paŝtejoj, ĝi tiriĝis ĉiam pli okcidenten.

Dum sia migrado la prahungaroj atingis la regionon de la Nigra Maro kaj ili vivis pli longan tempon ĉirkaŭ la rivero Dnjeper, kie ili interrilatiĝis kun slavaj popoloj, popolgrupoj. Pri la tie vivintaj hungaroj memoras en siaj kronikoj la grekaj komercistoj kaj vojaĝintoj, kiuj ofte vizitis la ĉirkaŭaĵon de la Nigra Maro. Tiuj estas la unuaj skribaj memoraĵoj pri la hungararo. Tiuj kronikoj diras pri ili inter aliaj, ke ili somere vagadis sur granda teritorio kun la bestaro, sed vintre ili retiriĝis en la valojn de la riveroj, kie estis ilia loĝtereno de konstanta karaktero.

Ni povas trovi la postsignojn de la ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj ankaŭ en la evoluo de la hungara lingvo. Parte interrompiĝis la senpera rilato kun la parencaj popoloj, kaj la lingvo ekiris sur memstara vojo, aliparte la nomojn de la pli novaj konceptoj transprenis la hungararo ĉiam de tiuj popoloj, de kiuj oni prenis mem la konceptojn. Tiamaniere ankaŭ la vorttrezoro konsiderinde pliriĉiĝis.

Poste pli nova ondo de la popolmigrado tiris la hungararon de la Nigra Maro al okcidento. Batalemaj turkaj gentoj okupis la ĝisnunajn paŝtejojn, kaj por povi postvivi, la hungaroj devis serĉi pli novan paŝtejon. Ili atingis la Karpat-basenon en la 9a jarcento laŭ nia erao. La tradicio fiksas la daton de la patrujkonkero en la jaro 896. Estas supozeble, ke la unuaj grupoj de la hungaroj alvenis jam multe pli frue en la Karpat-basenon, kaj la dato 896 signas sole la definitivan ekposedon. La konkerantaj sep gentoj formis federacion en la 8a kaj 9a jarcentoj kaj reprezentis seriozan militan forton. Inter la sep gentoj estis kelkaj, kiuj parolis la turkan lingvon. La milita organizado de la gento-federacio havis turkecan karakteron.

En tiu tempo la teritorion de la Karpat-baseno loĝis popoloj okupiĝantaj pri agrokulturo kaj parolantaj la slavan kaj eventuale la turkan lingvojn. La hungaraj gentoj subjugis tiujn ĉi popolojn. La kunmiksiĝa procezo havas signifan lingvan restaĵon: konsiderinda kvoto de la vorttrezoro — fakvortoj de multnombraj domindustriaj okupoj kaj de la pli granda parto de la agrokulturo — estas slavdevena el tempo de la patrujkonkero.

La hungararo en la Karpat-baseno dum jarcentoj daŭrigis la saman bataleman vivmanieron, kiel la bestbredistaj popoloj, — inter ili la plej potencaj hunoj, — kiuj venis pli antaŭe en la Karpat-basenon. Sed la imperio bazita sur bestbredado kaj perforta terakiro ne povis havi longan vivon. Ankaŭ la potenca huna imperio mueliĝis kaj malaperis de sur la scenejo de la historio. Tiu sorto estus atendinta ankaŭ la hungararon. La unuiĝo de la ĉirkaŭantaj popoloj, kiuj posedis pli modernan teknikon kaj vivis en pli evoluinta ŝtatordo, fine ruinigis la militan gloron de la hungaraj gentoj. Inter tiaj cirkonstancoj la hungaroj havis nur unu solan vojon por sin konservi: ili devis transiri al la pli moderna terkulturado kaj devis alproprigi tiun kulturon, kiun Eŭropo alkroĉis tiutempe al la kristanismo. Se tiun paŝon ne farus la bredista popolo, ĝi estus nesaveble pereinta. La transiro al la terkulturado kaj al la adepto de la kristanismo povis realiĝi helpe de centrigita reĝa potenco. Ĉio ĉi estas ligita al la nomo de la unua reĝo, Stefano. La fortmana reĝo kun fera konsekvenco rompis la kontraŭstaron de la gentestroj, nuligis la ribelulojn, organizis la mezepokan hungaran ŝtaton. Lia rolo, signifo estis tre granda, antaŭenmontranta.

RESUME: La hungararo — laŭ la nuna starpunkto de la scienco — sendube devenas el inter la finn-ugraj popoloj. Ankaŭ la bazo de la vorttrezoro estas finn-ugra. La prapopolo parolinta jam unuecan lingvon vivis en la regiono de riveroj Kama kaj Bjelala. Tiuj gentoj, kiuj estas la senperaj prauloj de la hungararo, inter la 10a kaj la 5a jarcentoj antaŭ nia erao formigris sudorienten. Tiutempe ili estis ankoraŭ en strikta interrilato kun la voguloj kaj ostjakoj, kiuj nun vivas en la ĉirkaŭaĵo de riveroj Ob kaj Jenisej. Pli poste ili interrilatiĝis kun surstepaj brutbredistaj popoloj kaj interrompiĝis la senpera rilato kun la ostjakoj kaj voguloj. En la medio de la bredistaj popoloj fundamente ŝanĝiĝis la vivmaniero de la hungaroj, kiuj ĝis tiam okupiĝis pri kolektado, fiŝkaptado, ĉasado. Ili ekkonis la terkulturadon. Ekkoninte la surstepan vivmanieron, la hungararo, — kiu jam vivis en gentofederacio kun certaj turkaj gentoj, — pro la devigaj cirkonstancoj aliformiĝis je konkeranta ĉevalista popolo. La hungararo kiel konkeranto atingis la Karpat-basenon. Sed la bredista, konkeranta vivmaniero en longaj historiaj perspektivoj ne estas vivipova. Post rapidaj kaj efemeraj sukcesoj, tiuj popoloj malaperas sen postsignoj de sur la scenejo de la historio. La hungararo transirinte al terkulturado, kun la volo adaptiĝi al la okcidenta kulturo, ekiris al neantaŭvideblaj perspektivoj de la historio.

(El la traktato de muzeodirektoro Miklós Szilágyi kaj prof. Imre Kádár, prelegita dum la V-a Somera Esperanto Universitato en urbo Gyula, kun la permeso de la Aŭtoroj, — ekstraktis

d-ro *Jozefo MÁTÉFFY*

Károly JOBBÁGY

Du Poemoj

SEN ŜIRMORETO

MONOLOGO DE MALJUNIĜANTA AKROBATO

Forigu el sub mi la ŝirmoreton,
la zonon same de mia tali'!
Mi volas salti sen ili de nun.

La kazo malsamas, se rolas junuloj!
La publikon distras la movoj artaj:
transkapaj saltoj, jen du aerruloj
kaj torditaj turnoj akrobataj
kaj ĉiam novaj variacioj
dankataj per ardaj ovacioj.

Mi, kvardekjara, al tio jam molas,
tamen la flugon supre interrompi,
la trapezon lasi mi ne volas.
Sed nek mi volas la spektantojn trompi.
For el sub mi do la ŝirmoreton!
For la zonon de sur mi, la fortan!
Ke la publik' aŭdigu murmureton
kaj sentu ekscitiĝon nervotordan,
sciante: sekvos eble morta bat':
ĉar riskas sian vivon l'akrobat'.

La juna? — rekomencas post la falo.
Por mi ne estas ebla jam tio.
Ĉi akrobataĵoj en la halo
de l'cirko estas por mi ja ĉio.
Estu de nun — mi volas — ĉiu salto
— se necese — mia lasta ario.
Forigu el sub mi la ŝirmoreton!
Ludu orkestro! Tamburoj tondru!
Svingu al mi de transe la trapezon!
... Mi startu!

EN KNABINA KLASĈAMBRO

Knabinoj blondaj, brunaj kaj nigraj
kun pendantaj aŭ taŭzitaj haroj
pepadas ĝardene kiel viglaj
kokidoj po grupetoj aŭ paroj.

Kaŝi apenaŭ ili ja povas
la feliĉon esti dek-kvin-jara,
kaj se la neĝ' la stratojn ekkovras,
ili jubilas kun ĝojo klara.

Ene de l'poŝoj aparta mondo:
pupo, sukero, ruband' sin trovas,
kaj se la poent' por la respondo
tre malaltas, kelkaj laŭte ploras.

En iuj okuloj tamen ardas
kelkfoje momenta stranga lumo,
ke kun tremet' mi ŝin alrigardas,
kaj tuŝas min de l' har' la parfumo.

Ŝi ne scias, sed mi bone vidas:
Jam vekiĝas en ŝi la virino,
survizaĝe konkeremo sidas,
kreskas jam la virkapta rutino.

Ho Dio! Ŝi jam de fajro plenas,
kaj estos la fat' por viroj multaj,
kiujn la deziro al ŝi pelas:
ili forbrulos por ŝi, la stultaj.

Tion pensante iom mi haltas
ĉe la flamo de tiu rigardo.
(Ĉar ja mi ankoraŭ june fartas,
kaj ekscitas min ĝia ardo.)

Kun kapo klinita ŝi jam skribas,
aŭ ekpinĉas najbarinon ŝtele.
En mi ankoraŭ memoroj drivas,
kaj la sango tamburas ŝvele.

Kiel se mi venus tra la pordo
el tigrokaĝo post la studohor',
kaptas la klinkon per lasta forto,
kaj ekĝemas mi en la koridor'.

Tradukis: Tibor ÚJLAKY-NAGY

Károly Jobbágy *(nask. en Balassagyarmat, 27. 5. 1921): poeto, arttradukisto. Kiel studento li aliĝis al la socialisma laborista movado, lia unua poemo aperis en sia 18-a jaro en „Népszava" (Popolvoĉo). Liajn verkaĵojn presigis la revuoj „Kelet Népe" (Popolo de l'Oriento), „Híd" (Ponto), „Ünnep" (Festo) kaj ankaŭ aliaj gazetoj. Post la soldata deĵoro kaj soveta militkaptiteco li fariĝis oficisto. En la vespera sekcio de la universitato akirinte diplomon de mezlerneja profesoro el la hungara kaj rusa lingvoj, li fariĝis gimnazia prof. Per siaj poemoj li denove sin anoncis en 1953. En 1954 kaj en 1963 li estis distingita per la premio József Attila. En 1955 oni eldonis lian volumon „Feltámadás" (Reviviĝo), en 1956 „Hajnali viadal" (Aŭrora lukto) kaj en 1962 „Hó és Nap" (Monato kaj tago) liajn novajn poemojn. El liaj poemoj parolas la senripoza kaj arda publikviva liriko de homo brulanta en sorĉado de la vigla realo, sed li okupas sin multe ankaŭ pri problemoj de la amo. Multaj el liaj poemoj apartenas al la intelekta liriko. En siaj pasiaj-impulsemaj poemoj li parolas ofte per impeta patoso pri fenomenoj de la hodiaŭa vivo. Li tradukis ĉefe el rusaj poetoj (Puŝkin, Nekrasov, Jesenin, Brjusov, Majakovskij, Martinov.)*

(Artikolo en „Magyar Irodalmi Lexikon", Hungara Literatura Leksikono, 1963.) Károly Jobbágy estas ankaŭ adepto de Esperanto.

RECENZO

La Germana Popolo kaj la Unuiĝintaj Nacioj. Eldonis: Deutsche Liga für die Vereinten Nationen, Dresden, 64 paĝoj. La broŝuro pledas por ke Germana Demokratia Respubliko (GDR) estu akceptita kiel ŝtatmembro al la Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj. Sed ĝi pledas ne nur por GDR, sed ankaŭ por Okcidentgermanio, dirante per tio ke certe malstreciĝus la nuna situacio inter la du Germanioj. La broŝuro pruvas elokvente, kial oni devas akcepti ambaŭ Germaniojn, kiel ŝtatmembrojn. Sed ĝi montras ankaŭ tion, ke en Okcidentgermanio bedaŭrinde ankaŭ nun multaj iras la vojon de faŝismo, kaj tion oni povas forigi nur per la unuigo de ambaŭ germanaj ŝtatoj. La lingvaĵo estas modela, escepte kelkajn malfacilajn nekutimajn frazojn. *(La. So.)*

Otčenášek: Romeo, Julieta kaj la tenebro. El la ĉeĥa tradukis: Vladimir Váňa. Eldonis J. Régulo, 176 paĝoj. La situacio estas tute sama, kiel en la Taglibro de Anna Frank. La scenejo nun estas Ĉeĥoslovakio, kie la faŝistoj agis kun sama teroro, kiel en ĉiu lando, kiun ili okupis tiutempe. Temas pri juda knabino, kies gepatroj kaj parencoj jam estis ekstermitaj. Junulo ĉeĥa kaŝas ŝin en la postĉambro de tajlorejo de la patro. Ŝtelante el la kamero de la patrino, kaj duonigante sian propran porcion li nutras la knabinon. Fine tamen ankaŭ la gepatroj konjektas pri la kaŝo, sed ili ŝajnigas, kvazaŭ ili scius nenion. Legante la romanon oni havas la impreson, ke la knabo Paŭlo estis mem la verkinto de la romano. Ankaŭ ĉi tie la knabino ne sukcesas postvivi la kruelaĵojn de la faŝistoj. *(La. So.)*

MOZAIKO PRI JULIO BAGHY II.

EN SIBERIO

En 1962 Esperanto-klubo en Omsk preparis multobligitan eldonon „Poezia kajero". Memorante ke Julio Baghy loĝis en Siberio kiel kaptito dum la unua mondmilito, mi skribis al li leteron pri nia kajero. En la letero estis cititaj linioj el lia poemo „Stranga nostalgio" (Preter la Vivo):

Ho Dio, tamen je Siberi',
Min kial premas la nostalgi'?!

Senprokraste venis responda letero de Julio Baghy. Jen ĝi estas:

Tre karaj gesamideanoj,
du horojn antaŭ la forvojaĝo al la Universala kongreso en Kopenhago mi surpaperigas ĉi tiujn frazojn por saluti vin ĉiujn kaj deziras al vi prosperon en la privata, fruktodonajn sukcesojn en la kolektiva laboroj. Multaj jardekoj pasis ekde la tago, kiam mi forlasis Siberion, tamen vi bone divenis el miaj skribaĵoj, ke la jaroj pasigitaj tie lasis neforviŝeblajn rememorojn en mi. Multloke, sed precipe en Siberio, mi lernis estimi la rusan popolon, al kiu sincera simpatio ligas min. Kiam la unuan fojon mi vidis la belan filmon „Siberia rapsodio", mi konfesas, ke pense mi revagadis tie kaj larmoj trudis sin al miaj okuloj. La jardekoj pasis kaj la iama junulo nun kiel maljunulo 72-jara ridetas al vi. Sed tiu rideto esprimu al vi amikan kareson, koran saluton de via, de Siberio ofte inspirita, amiko: Julio Baghy. — Budapest, 3. VIII. 1962.

La letero estis presita en la „Poezia kajero".

Sikorski R.
(Omsk)

EN LA MILITKAPTITEJO DE BEREZOVKA

Jen efektiva relikvaĵo: Perioda gazeto „Színházi lap" (Teatra gazeto), eldonita la 8-an de sept. 1917. Kaj mi legas el la flaviĝinta papero, ke en la militkaptitejo de la Siberia Berezovka oni prezentis la opereton de Jacobi „Knabin-foiro". Unu el la aktoroj (kaj ankaŭ la reĝisoro) estis Julio Baghy, alia aktoro Miĥaelo Sárosi. Jen kion diris Baghy por la gazeto: „Mi fidas je niaj piedoj, ĉar vere mi ne scias, kie estas mia kapo. Mi dancas tion, kion mi volus diri."

La 3-a n-ro (26-a de nov. 1917.) enhavas eĉ pli interesajn indikojn pri Baghy: „Matene je la 7-a li jam sidas ĉe sia skribotablo. Jam de monatoj. Li verkas opereto-revuon, reĝisoras, dancas, gvidas E-kurson, alportas gvidartikolon, poemon, komponas muzikon. Ekde aprilo li nenion scias pri sia familio, lia animo ploras, tamen li instigas por ridegi, li mortas kiel lasta, por ke li fariĝu la unua en la nelaciĝemo. Je lia rideto penetranta en la animojn ekaperas talentoj, je lia reĝisora ekrigardo la ridego ĉesos sur lipo de kvindek homoj. Iom li tusas, liaj vangoj estas malgrasaj, li malbone dormas, sed lia muzo, lia bela vira forto tie brulas en liaj okuloj . . ."

Mi legas ankoraŭ: „La Hungara Teatra Ensemblo la duan fojon prezentis la japanan dramon de Baghy sub titolo „Uraŝima" en unu akto. Uraŝima prezentis Baghy, ankaŭ li estis la reĝisoro. — Samtempe la ensemblo prezentis la komedion de Ferenc Molnár „Sinjoro doktoro". Baghy estis la reĝisoro kaj rolanto de Puzser, Sárosi ludis la rolon de Bertalan. — Sur la sama paĝo troviĝas desegnaĵo pri Baghy. Li aspektas tre maldika. Li tenas cigaredon, resp. ilojn de rompŝtelisto en la manoj.

(L. K.)

EN ESTONIO

En 1931 Julio Baghy vizitis Estonion, kie li gvidis Esperanto-kursojn. Ekde tiu tempo la poeto havis firmajn kontaktojn kun estonaj esperantistoj kaj regule korespondadis kun ili. Intereson al la estonaj lando kaj popolo atestas ankaŭ kelkaj liaj verkoj: „La vagabondo kantas", „Fraŭlino Degel", „Knabinoj el Muhu". Nur kelkajn semajnojn antaŭ sia morto la poeto perletere adiaŭis siajn amikojn en Estonio, estonajn esperantistojn. Pro tio la estona esperantistaro kun profunda doloro funebras la forpasintan poeton kaj klinas la kapon antaŭ lia tombo. — La 29-an de marto Tallinnaj esperantistoj kolektiĝis por omaĝi la mortintan poeton, amikon kaj fraton. Pri la vivo kaj verkoj de J. Baghy parolis J. Ojalo,



En Tallin. en 1931 De dekstre Julio Baghy, Helmi Dresen, Hilda Dresen.

siajn rememorojn pri renkontiĝoj kun li rakontis A Hakk kaj N. Vahter, liajn poemojn prezentis I. Kelts. En la salono estis ekspoziciitaj ĉiuj verkoj de J. Baghy, fotografaĵoj pri li kaj lia vizito al Estonio.

J. Ojalo.

LA ORMONERO DE ESPERANTISTA KNABO

En la 1930-aj jaroj Haga esperantisto disponigis ĉiujare dek-guldenan ormonon por tiu infano, kiu sukcese faras la Esperantoekzamenon „A". En marto 1931 estis ceremonieto en Dordrecht, kiam 13-jara knabo, farinta la ekzamenon ankoraŭ en novembro en Arnhem, devis transpreni la ormonon. La tiam ĉeestanta Julio Baghy, kiu tie gvidis kursojn, enmanigis la valoran donacon al la feliĉa knabo Willem de

Groot el vilaĝo Sliedrecht. Dume li diris kelkajn instigajn vortojn. La de tiam fidela samideano W. de Groot — kiu ankaŭ mortis en la pasinta jaro, — foje rakontis, kio okazis kun la ormonero:

„Tiu feliĉa knabo estis mi. Ĝoje mi montris al miaj parencoj kaj amikoj la belan skatoleton kun la brila monero, sed poste, por malpliigi la financajn zorgojn de miaj gepatroj, en tiu kriza antaŭmilita tempo mi ofte proponis la elspezon de mia ormonero. Sed mia patrino estis pli prudenta, ol mi. Ŝi ĉiam rifuzis, dirante, ke mi tiel perdos neanstataŭeblan memorajon. — Tamen post jaroj mi elspezis ĝin kaj malgraŭ tio ne perdis la memorajon. Aŭskultu: Dum la lasta milito oni devis doni „malnovan oron" al la juvelisto por akiri gefianĉajn ringojn. Nek mia estonta edzino, nek mi havis objektojn el „malnova oro" kaj ni timis devi kontentiĝi pri malmultvaloraj ringoj. Tiam mi ekpensis pri mia ormono kaj oferis ĝin. Kaj neniam ĉi tiu ofero nin ĉagrenis, male estas ofte ĝojiga penso: kiel 13-jara knabo mi jam gajnis senkonscie ringojn por al mi tiam nekonata knabino kaj mi mem pere de Esperanto."

(P. B.)

REMEMORO EN AŬSTRIO

Adrienne Földi (Miskolc) afable sendis al nia redakcio numeron de la semajna gazeto „Obersteirische Nachrichten" (7 apr.). El plumo de nia malnova s-ano, la pacbatalanto d-ro Adolf Halbedl ni legis en la gazeto i. a.. „Lastatempe la E-movado suferis du gravajn perdojn; nome je la 18a de marto mortis en Budapest Julio Baghy, laŭ sia naturo ne-komparebla poeto kaj verkisto, iama aktoro, en la 77a vivojaro, kaj la 1-an de aprilo nia kara majstro Rudolf Pawlik, pensiita oficisto de la Aŭstraj Ŝtataj Fervojoj forpasis ĉi tie en Knittelfeld en la aĝo de 83 jaroj. La morto de la nomitoj signifas por ni perdon de du homoj, meritantaj plej striktsence la nomon noblulo . . . Baghy ĉiam dediĉis sin al tiu lingvo kaj akiris mondfamon per siaj multnombraj verkoj; liaj laŭforme perfektaj, sencoriĉaj kaj sentoplenaj poemoj kaj prozaĵoj, same talente tradukitaj, estus ankaŭ ornamo de ĉiu nacia literaturo. Baghy estis membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA, kaj konkeris al si kiel solulo en la tuta mondo la amoplenan karesnomon „paĉjo", ĉar li havis unike afablan kaj same ardan kaj gajan humoron. Ĉiam la esperantistoj de la tuta mondo malĝoje sentos lian foreston. Same kiel Julio Baghy, ankaŭ Rudolf Pawlik kunportis kaj konservis Esperanton kiel eternan spertotrezoron en la Siberia militkaptitejo en la unua mondmilito . . ." — Ni laŭde mencias la simpatian agon de d-ro Halbedl, kiu en sama artikolo rememoris pri po unu granda batalanto de Esperanto en Hungario kaj en Aŭstrio.

BEDAŬRINDA ERARO EN „ESPERANTO" DE UEA

En recenzo de N. Rytjkov (okt. 67.) mi legas i. a.: „Julio Baghy estis granda esperantisto: tamen, kiel poeto, li ja ne estis grandulo." Ĝis nun ni ne legis similan konstaton pri la poezio de nia forpasinta Baghy. Certe ankaŭ inter la poemoj de Baghy estas diferencoj laŭ enhavo kaj poezia valoro, krome; neniu asertis, ke la poezio de nia Baghy estas nesuperebla, sed tian bagateligan opinion nun mi legas la unuan fojon. Mi forte bedaŭras tion.

(L. K.)

SUR BORDO DE DANUBO

Ni vagadis sur la Danuba kajo. Mi, kaj Julio Baghy. Bela, printempa tago estis. Antaŭ nur kelkaj tagoj finiĝis la nebula, malvarma vetero kaj la Suno, kvazaŭ ĝi intencus kviti sian ŝuldon, nun despli malavare versis la vivigajn radiojn al la renaskiĝanta Tero.

— Kiam vi esperantiĝis? — demandis subite Paĉjo.

La respondo ne estis tiom facila, kiel la demando sonis. Post iom da meditado mi diris:

— Mi estis 21-jara, kiam mi trastudis detale la gramatikon kaj mi legis la unuan libron. Klare mi memoras: ĝi estis „Tri rakontoj" de Tolstoj.

Dume ni venis al parkita placo; inter la herbobedoj logis nin benkoj.

— Ĉu vi ne emus sidiĝi iome? — demandis Paĉjo. — La vetero estas tre bela.

Ni sidiĝis vidalvide la sunon kaj mi soife sorbis la vivigantajn radiojn.

— Do, vi esperantiĝis en via 21-jara aĝo — konkludis Paĉjo.

— La afero ne estas tute klara, — mi diris hezite, — ĉar mi jam antaŭe sciis pri Esperanto kaj mi foliumis la gramatikon. Do, la dato de mia esperantiĝo dependas de tio, kiel ni difinas la sencon de „esperantiĝo".

— Esperantiĝo signifas: fariĝi adepto de Esperanto.

Tiu difino vekis novajn pensojn en mi.

Nome, mi eksciis pri la ekzisto de Esperanto en mia dekkvara jaro.

Tiam mi tralegis unuafoje mallongan gramatikon el „ŝlosilo" kaj tuj mi eksentis, ke tiu grandioza kreaĵo estas la plenumo de miaj deziroj, vivanta delonge en mia animo.

Sed tiuokaze . . .

— Tiuokaze mi estas esperantisto jam antaŭ ol mi sciis pri la ekzisto de la lingvo — mi diris.

Ridete mi rigardis al Paĉjo, kredante, ke mi diris amuzan ŝercon kaj mi atendis la efikon de mia spritaĵo.

Sed Paĉjo tute ne ridis pri mia paradokso. Vigle, sed sen iu ajn surprizo li respondis:

— Tre prave. Ĉiam mi diris, ke vera esperantisto ne fariĝas, sed naskiĝas. Vera esperantisto havas specialan, denaskan naturon: li klare komprenas la unuecon de la homaro kaj despli estas al li fremdaj la fortoj, kiuj disigas la homojn al malamikaj grupoj. Esperantismo estas laŭnaska trajto. Instinkto. Iaspeca supergrupa psikaĵo, destino, misio.

La printempa suno brilis plenforte. Al mi ŝajnis, eĉ pli bele. Brilis la ĉarma, homarana animo de Baghy en le mond' eterne militanta.

Sándor SZATHMÁRI

Sándor KÖKÉNY:

PROGRESO DE LA TAJPADO EN HUNGARIO

La preskaŭ nemezurebla plilarĝiĝo de la konoj, la rapidega evoluado de la sciencoj necesigis tutmonde pli intensan okupiĝon pri la problemoj de la pedagogio. Plua evoluado estas imagebla nur, se oni trovos la ĝustan vojon: kiel oni povus alproprigi la konojn kaj lertecojn (rutinojn) kiel eble plej rapide kaj funde.

Ĝuste la evoluigo de la pedagogio faras neevitebla la kreon de la laŭtempaj lernejosistemoj. En Hungario en la lastaj jaroj okazis treege gravaj paŝoj por modernigi la organizadon de la instruado: en 1960 ankaŭ en tutmonda rilato atentinda leĝo estis akceptita pri evoluigo de la instru-sistemo.

La nova instruada reformleĝo enkondukis multajn bonegajn novigojn. El ili nun ni ellevas la reformon de la mezgrada instruado. Laŭ tio en Hungario funkcias duspecaj mezlernejoj: la gimnazio kaj la fakmezlernejo. Ambaŭ lernejotipoj baziĝas sur la okjara instruado de la elementa lernejo, en ambaŭ tipoj la tempo de la instruado estas kvar jaroj, post kiu la gelernantoj metas la maturecan ekzamenon, kiu rajtigas ilin por akcepto al kiu ajn universitato aŭ altlernejo.

La primara celo de la gimnazio estas preparado al superaj studoj. Ankaŭ la faka mezlernejo celas la superan instruadon, ĉefe el la propra fako, sed ĝia celo estas ankaŭ tio ke la faka mezlernejo krom la ĝenerala kulturiteco certigu instruitecon en iuj fakoj. La fakmezlernejo certigas la ĝeneralan kulturitecon per instruado de komuninteresaj fakoj (hungara lingvo kaj literaturo, rusa lingvo, estetiko, geografio, matematiko, fiziko, kemio, biologio, gimnastiko). La kvin ĉefaj grupoj de la faka instruado estas: la industria, agrikultura, ekonomia, higiena kaj ceteraj fakoj.

Unue la ekonomia faklernejo ekfunkciis en kadro de la reformo kiel novtipa faklernejo, kun pluraj sekcioj. En ĝia tajpista kaj stenografa, publik-administra, krome en fremdlingva tajpista kaj stenografia sekcioj okazas la edukado de la profesiaj stenografoj kaj tajpistoj. Tia adapto de la stenografio kaj tajpado en kadro de la mezgrada fakinstruado estas tre grava — kaj signifas progreson ankaŭ kompare al la lerneja sistemo de la najbaraj landoj.

En Bern. De maldekstre: D-ro László Barabási, gvidanto de la hungara delegacio, Elizabeta Varga-Tarr, Sándor Kökény, lernejdirektoro kaj s-ino A. Rajkai. La foton faris inĝ. Miklós Blasovszky, faktradukisto

La stenografio en Hungario havas malnovajn tradiciojn. La hungaraj stenografoj ĝuste en 1968 festas la 125-jaran datrevenon de la unua hungara stenografia konkurso, kiun aranĝis Lajos Kossuth, unu el la plej eminentaj patriotoj, gvidanto de la liberbatalo en 1848—49. Ankaŭ li mem diktis la tekston de la konkurso.

La tradicioj de la tajpado en Hungario etendiĝas ĝis la 18-a jc., kiam en 1775, la hungara scienculo Farkas Kempelen pretigis la unuan funkciantan skribmaŝinon de la mondo. La tajpado kiel praktika skribsistemo komencis sian karieron nur fine de la 19-a jc. Kun la tajpado mem kiel kun scienco, kun ties teoriaj problemoj oni okupis sin nur de unu-du jardekoj. Kaj tiu ĉi teoria esplorado alportis vere multajn praktikajn rezultojn.

El tiuj ĉi esploradoj estas atentindaj la statistikaj ekzamenoj konekse kun la psikologio de la tajperaroj. Tiujn ĉi spertojn bone utiligis la nova instrumetodo, kiu ebligas pli rapidan kaj pli konfidindan ellernon de la tajpado. Ĉe ekzamenado de problemoj, kiel oni pliigu la rapidecon, oni aplikas analizadon de testoj kaj malrapidigitajn filmojn. Multe oni okupas sin ankaŭ pri kompleksaj esploradoj. Laŭ la tiel ricevitaj rezultoj pretiĝis lernilo-familio, lernolibro-serio de la tajpado el kvar volumoj. La du unuaj volumoj donas tre abundan ekzercaron por la dekfingra blindskribo — ekiranta el la baza situacio de la

fingroj (a s d f j k l é); la tria kaj kvara volumoj instruas la ŝvebantan mantenon.

La hungaraj fakuloj faras multdirektajn esploradojn ankaŭ pri aplikado de la modernaj mekanikaj iloj de la instruado, per kiuj iloj la pedagogoj de la tajpado faras la instruadon ne nur pli interesa, sed ankaŭ pli rezultoplena (magnetofono, filmprojekciado ktp.).

La teoriaj ekzamenadoj alportis tre favorajn ŝanĝojn ne nur en la lerneja instruado, ja estiĝis grandiozaj rezultoj ankaŭ en la pli altaj gradoj de la tajpado. Ankaŭ la gazetaro rememoris pri tio, ke en 1967 en Bern — okaze de la kongreso de Intersteno aranĝita tajpista mondĉampioneco la mondĉampionino de la senerara tajpado estis la Budapeŝta oficistino Elizabeta Varga-Tarr. Per sia malnov-tipa sveda skribmaŝino Halda ŝi gajnis ne nur la mondĉampionecon de la kategorio de la mekanikaj skribmaŝinoj, sed per sia rezulto ŝi superis ankaŭ la elektronikajn skribmaŝinojn. En la rapideca konkurso alia hungara oficistino edzino de Arturo Rajkai fariĝis la kvina.

Krom la altgradaj konkursoj en Hungario oni aranĝas ĉiujare ankaŭ landan tajpistan konkurson de la gelernantoj kun pluraj miloj de partoprenantoj. Krom la rapideco ricevas ĉiam pli gravan akcenton la kvalito: ĉiam pli multaj gajnas la premion de la senerara tajpado.

La tajpado kaj la stenografio havas parencecon ankaŭ kun la internacia lingvo. La tajpado kaj la stenografio volas plifaciligi kaj plirapidigi la skriblaboron, Esperanto ebligas la komprenon inter diverslingvaj homoj. La teknika kaj politika progresado grandmezure helpos la pluan disvastigon de la tajpado kaj stenografio kaj ankaŭ tiun de Esperanto.

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

La moderna Ŝtata Pupteatro en Budapeŝto — kies geaktoroj prezentis belan Andersen-fabelon dum la UK 1966 — funkcias jam de dudek jaroj. Kaj dum tiu tempo vizitis ĝin jam pli ol kvin milionoj — infanoj kaj plenaĝuloj. Multaj, kiuj iam kiel infanoj admiris kaj amuziĝis ĉe la artaj ludoj de la pupoj, tiel ekkonante la fabelojn de Gorkij, la landon de la insektoj, la parolon de la bestoj, la mirindaĵojn de Mil kaj Unu Noktoj, la hungarajn ferakontojn, nun jam eble kondukas siajn etulojn aŭ gelernantojn en tiun etan teatron en mezo de la hungara metropolo. La Budapeŝta Pupteatro — kiel certe ankaŭ la alilandaj pupteatroj — donas arte, amuze kaj amike distriĝon, instruon kaj kulturon al infanoj kaj al plenkreskuloj. *(P. B.)*

*

S-ro Eugen Hermann, Paris, 70 rue Stendhal, ni salutas vin kore. Ekde 1961 vi vizitis Hungarion jam la kvaran fojon. Nun ni legis en via letero, aperinta en la grava ĵurnalo „Népszabadság" (Libero de l'Popolo), ke vi spertis multe da progreso en nia lando kaj konstatis ankaŭ la leviĝon de la vivnivelo. Kiel vi skribis, la evoluado kaj la ŝanĝo de la pensmaniero de la homoj superas vian atendadon. De Skotlando tra Francio, Germanio kaj Aŭstrio vi nenie trovis kamparanojn, kiuj vivus pli trankvile, ol tiuj en la hungara vilaĝo Öcsöd. Tamen vi mencias ankaŭ negativaĵojn, kaj ni dankas vin pro la bonintenca kritiko. Vi skribis, ke en la vilaĝo Balatonszemes ĉ. 15 ripozejoj havas apartan malgrandan akvoaparaton — kvankam estus pli ĝuste konstrui por la tuta vilaĝo unuecan akvokondukon. En la sama vilaĝo la fertraboj tenantaj la tegmenton de la ĝardena kinejo pretiĝis el elementoj de fervoja ponto, sed — kiel vi diras — oni uzis almenaŭ sesoble pli da fero, ol estis necese.

*

Zoltán Kodály, la mondfama hungara komponisto, muzikpedagogo kaj muzikologo, mortis antaŭ unu jaro, la 6-an de marto 1967. Okaze de lia 85-a naskiĝtago, la 16-an de decembro, kaj ankaŭ okaze de lia mortotago la hungara gazetaro kaj multaj lernejoj inde rememoris pri la komponisto de Dancoj de Galánta, Psalmus Hungaricus, Háry János kaj aliaj tre valoraj verkoj. — Nun ni ĝustigas etan eraron de nia artikolo 1967/2. Kiel Z. Kontra, el la Muzikarta Faklernejo Bartók atentigis nin, Kodály lernis en gimnazio ne en Szombathely, sed en Nagyszombat.

HUNGARA VIVO, kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio per tiu ĉi numero komencas sian 8-an jarkolekton. Ni klopodis kaj klopodos ĉiam plibonigi kaj plibeligi nian revuon. Nun, kiam nia abonprezo ŝanĝiĝos, ni informas niajn karajn abonantojn pri la jenaj: La nova jara abono estas 32 forintoj, al eksterlando krome 6.40 Ft. La 1-an numeron de Hungara Vivo niaj abonantoj ricevos laŭ la malnova prezo, la tutjara abono por 1968 estos 29 forintoj, la abono pagita por eksterlandanoj en nia lando plus 6,40 forintoj kiel poŝtelspezo. Sekve la abono enlande por la unua duonjaro estas 13 forintoj, por la dua duonjaro 16 forintoj. Ni petas ĉiujn niajn karajn abonantojn kaj legantojn, helpu nin ankaŭ estonte en nia grava laborado.

Por la Metro de Budapeŝto daŭras ega laboro. La nun konstruiĝanta orienta-okcidenta ĉeflinio havas dek kilometran distancon, tridek kvin ĝis kvardek- metran profundecon, kaj oni konstruas du paralelajn tunelegojn kun rondsekco de sep- metra diametro. La konstruadon faras malfacila preskaŭ unike malfavoraj geologiaj cirkonstancoj. La subgrundo de Budapeŝto ja estas riverega sedimento; malkompakta, ŝlimhava sablo. Krome en profundeco de dudek kvin ĝis tridek metroj jam abunde troviĝas grundakvo, plej granda danĝero de la subtera konstruado.

*

En kadro de la Internacia Foiro de Budapest okazos la 20-an kaj 21-an de Majo 1968 eu la ĉambrego de la Konstrulaborista Sindikato (angulo de avenuo Dózsa György kaj aleo Gorkij) la dua kongreso de Teknika Ligo de Internacia Scienca Asocio Esperan- tista. La diversfakajn esperant lingvajn prelegojn partoprenos ankaŭ eksterlandaj membroj. Dum la Foiro staras je dispono de la vizitantoj Esperanto-Informejo en la pavilono de la Aŭtomobiltrafika Entrepreno.

Szilárd Bálint, membro de la Redakta Komitato de Hungara Vivo la 26-an de aŭgusto ekiris el Budapeŝto al Uzbekistano kun 51 hungaraj esperantistoj. (Kiel pri tio raportas nia artikolo de Jenő Cseszkó). La 29-an trafis nian amikon malagrabla

akcidento, kaj la 30-an li devis ekkuŝi en la Traumatologia Kliniko de Medicina Universitato, Kirurgiejo N-ro 1. en Aktjubinsk. La kuracistoj konstatis, ke liaj du ripoj rompiĝis, la brustomembrano („pleura") estis transpikita ktp. Nia amiko Bálint pasigis dek tagojn en la hospitalo. Li do ne povis vojaĝi al Taŝkento, ĉefurbo de Uzbekistano, sed ankaŭ tiuj dek tagoj en Kazaĥstano restos por li kaj por lia kune restanta edzino neniam forgeseblaj. La ĉefkuracisto-docento Ŝairo Eduard Ivanoviĉ, la kirurga ĉefkuracistino-docentino Tarafonova Lidija Nikolajevna, la du flegistinoj (maldekstre) Ŝiŝeckina Anastasija Aleksejevna, (dekstre) Jahnenko Rapeja Sergejevna, inter kiuj sidas laŭ nia foto s-ino Bálint, kaj ankoraŭ multaj en Aktjubinsk helpemaj, ĉarmaj kaj fakspertaj homoj de la hospitalo meritas la plej sincerajn dankojn kaj rekonojn de la geedzoj Bálint kaj al tio aliĝas ankaŭ la red. komitato de Hungara Vivo. Kiel Szilárd Bálint skribis en sia raporto: „Homo por homo estu frato, amiko kaj la gastamo estu la leĝo en ĉiu lando."

*

„La feliĉa Vera". Hungara Filmsemajno okazis en Aŭgusto kaj Septembro en Londono. La ĵurnalo Evening News konstatis, ke Hungario jam fariĝis filmprodukta lando, kiun oni vere devas priatenti. Daily Mail — aperinta en tri milionoj da ekzempleroj — komunikis bildriporton pri la aktorino Vera Venczel sub titolo „La feliĉa Vera". La ĵurnalisto emfazas, ke la hungara aktorino en mini-jupo aspektas kiel efektiva angla fraŭlineto — kvankam ŝi alvenis el Budapeŝto. „La sinvestado — li skribas — ŝajnas

esti internacia, sed la lingvo bedaŭrinde ne. Pro tio Vera bezonis interpretiston, por ke ŝi povu konversacii kun siaj anglaj amikoj." — Mi aldonas ankoraŭ, ke mi konas jam de ŝia 12-a jaro tiun ĉi tre junan, talentan, (eĉ internacie) faman aktorinon. Tiam ŝi plezuris ĉe la belaj Esperanto-prospektoj, eĉ konis la fabelon de „Adamo kaj Eva" en koncepto de nia kara Ferenc Szilágyi. (L. K.)

EĤO – REEĤO

Romano Grinŝpan, Taŝkent. Bv. permesi, ke el via privata letero ni presigu la sekvan komuninteresan proponon: „E-istan renkontiĝon devus partopreni ne hazardaj turistoj, sed veraj e-istoj. Neniu rajtu aserti, ke sub ŝirmo kaj masko de E venas simplaj turistoj, kiuj ne komprenas eĉ „Bonan tagon." Ĉiu partoprenanto prezentu atestilon, ke li perfekte ellernis almenaŭ komencan kurson pri E. Tia ordo stimulos homojn pli serioze rilati al la lernado de E." Ĉar ankaŭ ni mem spertis, ke ofte amase utiligas la kongresojn ktp. de E kiuj eĉ malbone ne kapablas paroli E-n, ni pensas, ke ĉiuj niaj organizaĵoj serioze pritraktos vian proponon.

J. J. de Groot, Amsterdam. Dankon pro via letero, en kiu vi rememoras pri la belegaj poemoj de Julio Baghy. Vi skribis poste: „Tre interesas min la belaj artikoloj de Sándor Szathmári, Borbála Szerémi-Tóth k. a." — Vi mencias ankoraŭ, ke ŝajnas al vi, „kvazaŭ el tri hungaroj du estas poetoj." Via komplimento tamen rememorigas nin pri tio, ke ankaŭ inter niaj hungaraj amikoj troviĝas, kiuj sen elementa scio aŭ konjektado de la poeziaj reguloj kaj sen studado kaj kono de nia poezio kuraĝas verki aŭ traduki poemojn — por ofte ŝoki la malfeliĉajn lektorojn kaj redaktorojn.

Inĝ. Pavlos Giannelias, Lyon. En nia revuo ni ne diskutadas pri la -ata -ita problemo. Certe vi konstatis, ke ni lasas liberon por niaj kunlaborantoj en uzo de certaj formoj. (Ekz. -ujo kaj -io, Hotelo Paco kaj Paco Hotelo. Je la nomo kaj en la nomo.) La tro severa kaj strikta reguligo de la lingvo — laŭ nia opinio malfaciligas la ellernon de Esperanto.

Marie Bartosvká, Frydek-Mistek. Ni ĝojas, ke la karaj lernantinoj el via urbo fartis bone en la hungara vilaĝo Hodász. Esperanto denove servis utile, ĉar en tiel juna aĝo helpis la interamikiĝon de ĉeĥoslovakaj knabinoj kun hungaraj geknaboj. Vi menciis ankoraŭ, ke laŭ la opinio de ĉeĥoslovaka knabino „ne estas pli bona homo en la mondo ,ol Jozefo Mikulaŝ," nia instruisto-kolego en Hodász.

*

SIMPTOMOJ . . .

Redaktoro de germana sportgazeto skribis:

— En la unua duono de nia vivo ni gimnastiku, por esti fortaj, en la dua duono — por resti fortaj. Kiu sur la ludoplaco ĉagreniĝas pro la bonhumoro kaj bruado de la infanoj, tiu estas maljunulo. Kiu kompreneme ridadas pri la ludado, tiu estas sana homo. Kaj kiu deĵetas la mantelon, por ankaŭ partopreni en la ludado-kurado, tiu estas juna homo — sen konsidero de sia aĝo.

LA GVIDLIBRO II. PRI SÁNDOR SZATHMÁRI

S. Szathmári (1897—), hungaro, verkisto, maŝininĝeniero. Lia ĉefverko estas Vojaĝo al Kazohinio (SAT, 1958), aperinta jam pli frue ankaŭ hungare en pluraj eldonoj. En ĉi tiu romano la aŭtoro vojaĝas sub la masko de Gulliver al la insulo de homoj, kiuj estas tiel ideale perfektaj, ke al ili jam ĉio homa estas fremda, kaj poste li venas tie en la mondon de homoj, kiuj estas tiel trohomaj, ke tio jam estas ridinda frenezo. La libro estas gaje amuza, sed samtempe edifa, incita kaj maltrankviliga, kun satiro trafa, akra, senindulga. Libro Janus-vizaĝa: ĝi pafas — eble eĉ kontraŭ la propra intenco de la aŭtoro — kaj kontraŭ tiuj, kiuj volas ekstermi ĉiujn sentojn ĝis sterileco, kaj kontraŭ tiuj, kiujn ĝisabsurde regas „sentoj", „idealoj", „tradicioj". Krom tiu romano la aŭtoro publikigis plurajn novelojn en „Belarto", „La Nica", „Norda Prismo", „Sennacieca Revuo"; ĉi tiujn karakterizas sati-

remo vipanta tiranismon, servilismon, militismon kaj ankaŭ ĉiutagajn homajn rideblaĵojn. Lia prozvolumo „Maŝinmondo" (Stafeto, 1964) entenas du sciencfikciajn futur-novelojn. La titolnovelo diras amare, ke se la homaro donos sian sorton en la povon de la perfekte funkciantaj kaj konkludantaj maŝinoj, ĉi tiuj neniigos ĝin en ĝia propra intereso. La majstronovelo „Vincenzo" rakontas paralele la historion de granda scienculo kaj oportunisma karieristo.

Szathmári tradukis el Esperanto en la hungaran lingvon la romanon de Cezaro Rossetti „Kredu min, Sinjorino", aperintan en 1958.

(K. K.)

La grava ukrajna gazeto „Vsesvit" (La Tuta Mondo) en n-ro 8. 1967 publikigis artikolon pri Esperanto de la Kieva verkistino-tradukistino Nadija Andrianova. Por montri al la legantaro modelon de Esperanta belarta literaturo, la aŭtorino prezentis humuran-satirikan novelon de hungara esperantisto Sándor Szathmári, kies talentan tradukon ŝi mem faris. — La elekto de „Liriko" de S. Szathmári ne estas okaza. La ukrajna lingvo estas tre riĉa je diversaj esprimrimedoj. La plej subtilajn nuancojn de homa penso oni povas esprimi per vortoj trovitaj en mirinde abunda lingva trezoro de la ukrajna popolo. Ukrajnoj tre ŝatas humuron, bone komprenas ŝercon, la ukrajnan literaturon famigis multaj elstaraj humurverkistoj. Tial memkompreneble ukrajna leganto povas tute kompetente taksi la esencon de „Liriko". — Kun plezuro ni legis la novelon en Esperanto, kaj denove ĝuis ĝin en ukrajna lingvo. „Liriko" ricevis novan vivon, konservante sian originalan freŝecon.

Azarij Perelman (Kiev)

Robert BURNS;

MIA BELA MARI

Jen, portu vinon, verŝu ĝin
ĝis rando de arĝenta taso,
ke mian belan tostu mi
lastfoje antaŭ la forlaso.
Ĉe l' kajo dancas la boat',
jam kruda vent' komencas spiri;
en rod' la ŝipo — kaj nun mi
de mia Mari devas iri.

Trumpetoj sonas, flirtas flag',
la brilaj lancoj hirtas prete;
kun klama bru' la homa flu'
ekluktas sange kaj impete . . .
Sed ne violent' de mar' aŭ vent'
min igas nun hezite stari,
nek batalbru' de l' homa flu',
sed — lasi vin, ho bela Mari!

TRO JUNAS MI POR NUPTI, HO

Rekantaĵo: Mi junas, tro junas,
tro junas por nupti, ho!
Ĉi-aĝe domaĝe
de panjo min forkapti, ho!

Mi estas panja solinfan',
fremdul' min ĝenus, ho sinjor';
kaj kuŝi lite apud vir',
mi timotremus, ho sinjor'.

Jam pasis festo de Marten',
la vintraj noktoj longas jam;
kaj vi kaj mi en unu lit',
mi vere ne arogas jam.

Nun siblas tra la nuda bosk'
la vento tre severe jam;
sed, se revenos vi, sinjor',
pli aĝos mi somere jam.

MALJUNA EDZO

Ho kiel knabino, ja juna knabino
kun edzo maljuna akordu en ver'?
Fi al la kampanjo, pro kiu la panjo
min vendis por gajno de oro kaj ter'!

Li plendas mizere, matene, vespere,
li tusas kaj ternas en forna angul'.
Kun brust' apatia kaj sango glacia,
ho teda la nokto kun tia oldul'!

Li lamas kaj stumblas, li ĝemas kaj grumblas,
mi vane lin servas kun pleja skrupul'.
Li plage ĵaluzas, junulojn akuzas —
Ho ve, ke mi trafis al tia oldul'!

Onklin' mia Katje konsilis kompate,
konsilon mi sekvos kun nova stimul':
ribeli, lin peli en tombon — kaj celi
per lia oraĉo al brava junul'!

Elskotigis: *Reto ROSSETTI*

Rim: ROBERT BURNS (1759—1796). Skota poeto. Filo de terkulturista patro, de kiu li akiris tre malaltan edukon. Li intencis elmigri al Okcidenta Hindujo. Por tiu vojaĝo li volis akiri monon per liaj poemoj. En Edinburgh li ekkonis kelkajn eminentulojn de la tiama publika vivo. Li vivis taŭzitan, senordan vivon, fariĝis drinkema kaj melankolia. Plej grandan sukceson li akiris per la poemaro *„Melodies of Scotland"* (melodioj de Skotlando), en kiuj li verkis etajn, ĉiutagajn temojn per vera, poeta talento. Forte li simpatiis al la franca revolucio.

Lajos PUSZTAI:

SPERTOJ DE LA ESPERANTO-DISSENDOJ DE RADIO BUDAPEST

Ĉu povas ĉerpi instruaĵojn okdekjara „maljunulo" el vivo de dujara junulo? Ni ne ridetu, ne diru tuj, ke ne, ni ne respondu rifuze. La junulo ĉi-okaze estas la Esperanto-dissendo de Radio Budapest, kiu la unuan de februaro festis dujaran datrevenon de sia naskiĝo; kaj la „maljunulo" estas mem la Esperanto-movado, resp. lingvo, riĉa je varia vivo kaj travivaĵoj. Nu, ni rigardu do, kion vidis la „junulo" dum tiuj du jaroj?

La unua kaj eble la plej grava estas la postulo: ni plijunigu la tendaron de la lingvo Esperanto! Ĉu ni volas, ĉu ne, la tempo pasas, la homoj fariĝas pli aĝaj — eĉ la eterne junaj esperantistoj — kaj iliaj vicoj maldensiĝas. Bedaŭrinde, ankaŭ en la pasinta jaro ni devis streki multajn nomojn el la nomaro de aŭskultantoj de Radio Budapest, ĉar ili forpasis. Sed ni devas anstataŭi ne nur la foririntojn. Ĉu estas emo en la gejunuloj, por stari apud la batalantojn por la lingvo internacia, por doni pli grandan aŭtoritaton al tiu postulo, ke Esperanto fariĝu ĝenerale akceptita internacia pera lingvo? Kio koncernas la hungarlandajn spertojn de la pasintaj du jaroj, la perspektivoj estas kuraĝigaj — almenaŭ tio estas mia propra konvinko kaj sperto. Jen sekvas kelkaj ekzemploj.

La Kongreso en 1966, ties gazetara eĥo kaj tiu fakto, ke ankaŭ post la Kongreso restis la ĉiutagaj Esperanto-dissendoj de Radio Budapest, en pli larĝaj rondoj vekis la interesiĝon por la lingvo, ankaŭ en tiuj, kiuj antaŭe pensis, ke Esperanto estas iuspeca ekstravaganco aŭ hobio. Inter la interesiĝantoj troviĝas multaj gejunuloj, mezlernejanoj, universitatanoj kaj plenkreskuloj. Kiam fine de 1966, por pretigi radioriporton, mi partoprenis konferencon, kiu antaŭis la landan kunvenon de la Hungara Esperanto-Junularo, la nombro de la ĉeestantoj estis ĉ. kvindek. Post jaro, en alia simila kunveno la partoprenantoj atingis preskaŭ ducent. Ni ne serĉadu, pro kiuj celoj la gejunuloj ĉeestis la kunvenojn, ĉu eble pro simpla distremo, aŭ parto alvenis nur kiel akompananto al la vespermanĝo de la gejunuloj. Ĉiamaniere estas fakto, ke ili aŭskultis la prelegantojn, la deklamantojn kaj — aplaŭdis. Sed ankaŭ aliaj faktoj atestas pri interesiĝo de la junularo. En la universitatoj — kvankam provizore nur kun malmulta nombro — komenciĝis regula instruado de Esperanto. Ĉie en la lando komenciĝas centoj da kursoj. La junularo komencas rigardi Esperanton ne nur tempopasigo, sed ankaŭ scio, kiu estonte povas alporti ankaŭ materialaĵojn. Kaj tiuj gejunuloj, kiuj foje jam konatiĝis kun la lingvo, tion ankaŭ ekŝatas-ekamas, ĉar la lingvo estas facila kaj belsona, kaj ĉefe ĝi promesas ian utilon en la estonto. Tiuj gejunuloj post fino de siaj studoj ekiras kun kono de la internacia lingvo al siaj laborlokoj, en la oficejojn, fabrikojn, al diversaj postenoj de la komerco, scienco, administrado, kaj kiel novaj adeptoj de la lingvo ili certe luktos pli efike por ke Esperanto fariĝu ĝenerale uzata lingvo en ĉiuj rilatoj.

Alia instruaĵo, kiu povas esti utila por la „maljunulo", estas lingva.

Multaj el la eksteruloj, kiuj Esperanton ne konas, argumentas per tio, ke Esperanto estas artefarita lingvo, ke ĝi ne kapablas evoluadi kiel ia nacia lingvo, la „vivanta" lingvo. Sed kial ni ne povus nomi ankaŭ Esperanton vivanta lingvo, kiam ekz. la ĉiutaga dissendo de Radio Budapest, ankaŭ la ĉiutaga duonhora programo de Radio Warszawa, Esperanton faras konstante uzata kaj dum la uzado evoluigita lingvo. Tiuj radioprogramoj tuŝas ĉiun terenon de la vivo, la tagan politikon, la sciencon, la literaturon, la turismon kaj la sporton same, kiel ankaŭ la plej novajn rezultojn de la spacoesplorado. Oni devas trovi konvenan novan vorton por tiuj konceptoj, por esprimo de ideaj nuancoj, kiuj ĝis nun mankis ankaŭ en la naciaj lingvoj, pri kiuj vortoj ankaŭ Zamenhof ne povis sin decidi. Kiom ajn ŝajnas ĝusta la evoluigo de la lingvo en tiu rilato, do ĝia vivantigo, estus konsilinde, se la kompetenta forumo, la Akademio kiel eble plej rapide aprobus aŭ malaprobus la novajn nomigojn, naskiĝintajn en kiu ajn loko, do se la Akademio akordigus tiujn vortojn. Nature povas okazi ankaŭ tio, ke la Akademio ne ĝisatendos la elformiĝon de la novaj nomigoj, sed li mem kreos la necesajn novajn vortojn.

La tria problemo estas konstati la ĉefan instruaĵon de la dujara spertado de Radio Budapest. Jam multaj konstatis, ke Esperanto kiel internacia lingvo estas taŭga por la internaciaj rilatoj, por la reciproka konatiĝo. Mi uzis la vorton „reciproka", ĉar la leteroj de la aŭskultantoj alparolantaj la programon, certigas la reciprokecon. Tiuj ĉi leteroj, kiuj alvenas el ĉiu parto de Eŭropo, foje-foje eĉ el aliaj kontinentoj, pruvas tion, ke ni sukcesis konatigi kun niaj aŭskultantoj la vivon, laboron, progresadon, zorgojn, ĝojojn de la hungara popolo, ankaŭ la pejzaĝojn kaj kulturon de nia lando.

*

RADIO BUDAPEST, daŭrigas siajn ĉiutagajn Esperanto-dissendojn, laŭ Mez-Eŭropa tempo je la 20.30—20.45, tra la ondolongoj 13,8, 16,8, 30,5, 48,1, 25,2, 75,1, kaj 240. Aŭskultu, ni petas, tiujn ĉi interesajn dissendojn, en modela Esperanto, kaj skribu ofte al Radio Budapest, VIII. Bródy Sándor utca 7.

Márta NÁDASDI:

LA ORGANIZITA RIPOZADO DE LA LABORULOJ EN HUNGARIO

La terura bruo de la milito jam eksilentis, la multe suferinta popolo de nia lando jam sanigadis siajn dolorplenajn vundojn. Sed eĉ denombri estus malfacile la taskojn, kiuj atendis la homojn en la jaroj post la dua mondmilito.

Ĉu rekonstrui, fari loĝeblaj la detruitajn hejmojn, ĉu zorgadi pri nutraĵo, medikamento, ĉu preskaŭ rekrei la nemalhaveblajn uzobjektojn?! Ĉu krei novan vivon sur la humoj bruligitaj, forlasitaj kaj per sango trempitaj?

Malrapide tamen ekiris la sangocirkulado de la lando, ankaŭ la takto de ĝia pulso fariĝis pli regula. Kaj estas preskaŭ nekredeble: apenaŭ post du jaroj oni enprogramigis ne nur la vivogravajn taskojn. Tiamaniere naskiĝis decido de la sindikatoj ankaŭ pri la favorpreza ripozigo de la laboruloj.

Baldaŭ komenciĝis fervora laboro. Oni transformis kastelojn laŭ la plej modernaj postuloj, kaj la ripozejoj malfermis sian pordon al ĉiuj tavoloj de la laboruloj por agrabla ripozado kaj amuzado.

Komence de la sindikataj ripozigoj, kelkajn jarojn post la dua mondmilito, nur malmultaj homoj kapablis pagi eĉ la favoran prezon por la dusemajna gastigado. En tiuj jaroj la tuta vestaro de la plej multaj homoj konsistis nur el unu vesto. Multaj el ili nur honteme eksidis al la neĝblanke surkovrita tablo de la ripozejo, kaj timeme rigardis sian teleron, en kiu proponis sin delonge neviditaj bongustaj manĝaĵoj. Okazis en 1947 en la banejo Parád, ke simpla laboristo post kvartaga restado petis la gvidanton de la ripozejo, enpaki la nutraĵojn por la restintaj dek tagoj. Nome li prefere hejmenportus ĉion al sia familio, ol sola manĝi tiajn delikataĵojn.

Ŝipekskursantoj de Siófok al Balatonfüred

Juna edzino, kiu dum la milito perdis siajn proksimulojn, nur post longa persvadado decidis sin je dusemajna ripozado. Ŝin interesis neniu kaj nenio. En la unuaj tagoj dum horoj ŝi sidadis sola, melankolie. La ripozkunuloj tre kompatis ŝin, diskrete kaj helpeme staris apud ŝi. Ili komprenigis, ke ne nur ŝi havas malĝojon, do kredu, ke la vivo tamen estas bela, kaj la paso de la tempo ankaŭ por ŝi alportos

Ekskursantoj al la akvofalo ĉe Lillafüred

mildiĝon. Kaj post paso de du semajnoj la ripozkunuloj sukcesis veki ŝin el la letargio.

Sekve de la agrabla atmosfero en la ripozejoj kaj plena retiriĝo de la ĉiutagaj zorgoj, la homoj havas pli da okazo okupi sin pri siaj animaj problemoj. La homoj konatiĝas unu kun la alia pli rapide kaj malpli sindeteneme. La ripozado alportis ŝanĝon eĉ por la tuta vivo al multaj personoj, ĉar la dusemajna refreŝiĝo finiĝis ofte per geedziĝo.

Pasis jam pli ol dudek jaroj, kaj ni povas paroli pri pli gravaj ŝanĝoj. Hodiaŭ jam eĉ la plej simpla laboristo estas bone vestita. Oni eniras memfide kiun ajn ĉambron de la ripozejo, trankvile sidas en la ripozseĝo sub centjaraj arboj. La terkulturisto kaj la inĝeniero, la ministo kaj la pedagogo, homoj kun la plej diversaj profesioj ĉi tie kune manĝas, promenadas, interparoladas dum la du belaj semajnoj.

Mirinda estas la somera ripozado ĉe la hungara lago Balaton, kaj ankaŭ inter la montoj kaj arbaroj. Tamen la ripozado vintre estas ankoraŭ pli agrabla. Por tiuj, kiuj laboras en bru- kaj fumplenaj urboj, aŭ en minejoj, la pura aero estas vera bonfaro. Dum la vintra ripozado, eĉ en frosta vetero, oni povas ĝui la promenadon, ofte ankaŭ la sportadon en freŝa aero, dum du-tri, eĉ pli da horoj.

La lago de Hámor, ĉe Lillafüred

Ĉe la bordo de Balaton-Fonyód. En la fono Badacsony

La provizado de la ripozejoj de jaro al jaro evoluas. Ĉeestas kuracisto, eĉ se nur du-kvar horojn semajne. La „kulturoficisto" zorgas pri la amuzo de la ripozantoj, aranĝas ekskursojn, prelegojn, eĉ dancvesperon. La servistoj de la ripozejoj estas ĝentilaj, servopretaj. Kaj kiam la servistoj ricevas sian libertempon, rekompence ankaŭ ili ĝuas tie aŭ en alia ripozejo la saman ĝentilecon.

La organizita ripozado de la laboruloj estas grava akiraĵo de la demokratia reĝimo. De jaro al jaro kreskas la nombro de tiuj, kiuj partoprenas en la favorpreza ripozigo, kies mastro estas la sindikatoj, aŭ la entreprenoj mem. En 1963 ripozis 200 mil, en 1966 213 mil, en 1967 pli ol 222 mil laboruloj, en 1967 plus 50 mil geknaboj. Nun jam estas eble — precipe en la vintraj monatoj — kune ripozigi la gepatrojn ankaŭ kun unu aŭ du gefiloj.

La sanigripozejojn kaj sanatoriojn vizitas ĉiam pli multaj gelaboruloj. Bone progresas ankaŭ la eksterlanda interŝanĝ-ripozado kaj la turista ripozo. Krom la hungaroj ankaŭ multaj eksterlandaj gastoj povas konatiĝi kun diversaj pejzaĝoj kaj urboj de nia patrujo. Ili povas konvinkiĝi, ke krom la pitoreskaj vidindaĵoj de la Balatona regiono niaj belaj montaroj, la pinarboj kun viviga aero, la urboj kun variaj konstruaĵoj, niaj multaj sanigbanejoj prezentas multajn diversajn eblojn por tiuj, kiuj volas ripozi, deziras restarigi sian sanstaton.

La Sindikata Ĉefestraro en sia kongreso, okazinta en la pasinta Majo, aprobis la projektojn por konstrui novajn ripozejojn kaj modernigi la malnovajn. Oni konstruos novajn, grandajn ripoz-hotelojn en la plej sanigefikaj regionoj de nia lando.

Ni ne forgesu, ke unu el la plej belaj akiraĵoj de la socialisma prizorgado estas la favorpreza sindikata ripozigo, kies celo estas la premiado de la laboruloj, eminentaj en la laboro; krome certigo de ripozado por kiel eble plej multaj homoj inter kulturitaj cirkonstancoj.



Lillafüred vintre

Mihály VÁCI:

Rozoj sur la glacio

Falas la neĝo: flato de l'ĉielo, ĉiela klaĉo. Kirlado de refalintaj preĝoj. La neaŭskultitaj ĝemoj frostiĝas — reŝvebas al la varmaj buŝoj.

Falas la neĝo: — regimento de falintaj anĝeloj. La fabeloj, sonĝoj, nostalgioj — ĉi tiuj foraj stelloĝantoj amase, perforte intervenas en la dezertajn internajn aferojn de la tero.

Falas la neĝo: — la preĝo de la vintro. La tero perdiĝas en la densan, blankan, kompaktan barbon de la vintro. Falas la neĝo: plumoj flugiladas niajn ŝultrojn. Niaj flugiloj, kiujn ni ne ricevis tute, nun laŭfloke elkreskas el niaj ŝultroj.

Falas la neĝo: en densaj faldaĵoj susuras la leĝera, riĉdensa subjupo de la nokto, la noktĉemizo de turoj, kiuj atingas ĝis la piedoj. Falas la neĝo, la dormiga, kristala morfino, polvigita etero. Ni reĵetas nian vizaĝon, en sonĝo ni iras tra la parko, tra la neĝofalo, flankenpuŝante la neĝkurtenojn, nia vizaĝo gapas de unu salonego al alia. Post ĉiu kadukiĝa puntokurteno estas nova brilo. En la granda submontejo de la neĝofalado ni tranĉas tunelon. Ni iras tuŝante la branĉojn, falas sur nin la neĝobrilado. La lampoj de la elektra lumo estas knabinoj frostetantaj en ĝistere arĝentaj ĉemizoj, sur iliaj longaj cilioj brilas la degelinta neĝo. Peze genuas la arbustoj, terbatanta florado ŝarĝas ilin. La pinioj estas cignoj kun ĉielen atenta kolo: ĝis la tero ili malsuprenigas siajn pezplumĝintajn flugilojn. — La perforto de la neĝo muldis ilin je raketoj: la pinioj nun estas blankaj raketoj, kiuj atendas lanĉadon. Sur la branĉoj estas birdoj tegitaj per staniolo. Sur la kapo de la merlo estas blanka, pelta ĉapo de paŝtisto. La paruo el neĝkaverno palpebrumas al la lampolumo.

Ni iras duope en la ĉielo, en ĉi tiea „alia mondo", animoj kun vintra mantelo, serĉantaj feliĉon eĉ sur la tero, flamigantoj de ĝojoj.

— Rigardu! Tie je la fino de la parko, en la lumo de la lampovico, sur la benko sidas amanta paro. Geamantoj sur la manplato de la vintro: koroj metitaj sur la neĝon, rozoj plantitaj sur la glacion, libeloj fermitaj en kristalon. Geamantoj en la vintro: — flamo en tiu ĉi cindrofalado, birdvoĉo en la ruiniĝintaj ŝaktoj. Ni haltis, ni rigardis ilin de malproksime. La viro ĵetas unu piedon trans la alia, per la brako brakumas la virinon, kiu kunpremas sian kolumon. Ili sidas unu apud la alia. Kia fajro, kia ĝojo, eksidi en la neĝadon, nur dudek minutojn: la ĝojanta homo kaj la amanta sango eltenas tiom en la frosta mondo! Ili eksidas — spite ĉion! Venu vintro, neĝu sur nin! La amo vivas ankaŭ sub la neĝo. Ridetante ili toleras, ke la neĝo florumas ilin per sia dika tapiŝo. Plene kovris ilin la neĝo: je statuo. Kaj ili brilas interne, ĉar ili konas sian koron, kies ununura moviĝeto, ununura bato ĉirkaŭ ili forigas la vintron.

—Vi! Ili ne vivas!

—Ne frenezumu! Ili vivas!

Poste tamen mi fariĝas malcerta. Ja estas vintro. Ridaĉas la frosto post la dekoraĵoj de la neĝo. Ni ekfrostas.

— He! — mi krias. — Ĉu vi vivas?

Bruetas nun la akrido-svarmo de la neĝo. Ili sidas senmove. Ĉu ili mortis? Ni iras pli proksimen.

— Ili estas el neĝo! Rigardu! Iu knedis ilin ĉi tion. Ŝed tiel mirinde! Nur skulptisto li povis esti . . .

En la artlaborejo de la vintro, en la lumo de la neĝo estis ravanta tiu ĉi legendo knedita el neĝo, simbolo skulptita el densa nubo.

Ho — trompiĝinte ni ridetis — do tia oferdono de la amo jam estas videbla nur el neĝo? Ni rigardis unu al la alia, kaj tiam ni demandis ĉiujn amantojn: — ĉu ni eksidas en la neĝon, almenaŭ por tiom da tempo, ĝis la neĝo nin kovras, inaŭguras je sia statuo? Aŭ nur el neĝo oni povas knedi tian sindonon de la amo?

Post la dorso de la statuo, dek metrojn de ni, sur la vojo venis sola virino. Ni estis tiel emociitaj, tiel bonaj kaj bonhumoraj, ke ni petegis al ŝi:

— Bonan vesperon! Ĉu vi volas vidi ion admirindan? Venu ĉi tien, ni petas.

La povra, paralizita je la homeco, sin tiris en sian peltan kolumon:

— Lasu min en paco! Impertinenta! Kion vi imagas?

Mi imagis, ke vi estas homo, ke vi vivas, ke animo vin ebriigas, ke vi havas cerbon kaj ke ne vane naskis vin via patrino. Homaro, — kial vi plimultiĝas per tiaj? Dividiĝu en animojn, ne en ĉelojn. Ne per miliardoj kovru la teron, sed ĝin popolumu per animoj.

— Ho, vi! Eĉ neĝobulon vi ne meritas! — ni kriis post ŝin ridante. Pli fore denove venis du virinoj. Ni kriadis al ili. Ili forkuris.

Ni rigardis unu al la alia. Ĉu ni estas frenezaj? Sed kial? Ni nur ĝojis ĝis gorĝŝiriĝo kaj tion ni volis dividi kun aliaj. Ĉu tio estas frenezo? Ŝajne — jes. Por la homoj ne nur tio estas ŝarĝo, se vi dividas kun ili viajn zorgojn, ili ne scivolas ankaŭ pri viaj ĝojoj.

Ni ekiris al la hejmo — kaj tiam sur la vojo venis iu kontraŭ ni. Viro tretadis la freŝan neĝon. Ni vidis lin de proksime: bone vestita homo en la kvindekaj jaroj. Orkadraj okulvitroj, fajna ĉapelo, kulturita, pensanta vizaĝo. Intelektulo, kreanto aŭ „pli bona homo", mi ne scias, sed ni kredis, ke li estas inteligenta, samspeca al ni kaj dividas kun ni la zorgojn kaj la ĝojojn. Mi lin salutis.

— Sinjoro! Se vi volas vidi ion eksterordinaran: — la neĝan statuon de amanta paro! Antaŭ kelkaj minutoj povis ĝin knedi iu. Kredu al mi, ĝi estas mirinda. Venu kun mi, nur dek metrojn de ĉi tie. Tie en la parko. Venu!

Li eltiregis sian brakon el mia mano, admone li min riproĉis:

— Lasu min en paco. Ke mi iru al tiu direkto, sur la pli longa vojo! — kaj per siaj Chaplin-galoŝaj piedoj pluboatadis sur la sendube pli kurta vojo.

Soleciĝo ridaĉis ĉirkaŭ ni.

— Do vi estas tiuj? — kaj la impulsiĝemo vekiĝis en mi. — Do vi estas tiuj, kiuj eĉ por la ĝojo de aliaj ne emas devojiĝi sur pli longan vojon. Kiuj estas pigraj por fajfa bonhumora momento forlasi la pli kurtan vojon. Kiuj ankaŭ apud niaj ĝojoj krude fortretadas sur viaj pli kurtaj, pli komfortaj vojoj? Kiel do vi haltas apud niaj zorgoj? Vi estas tiuj, vi, kun koroj batetaj en galoŝoj, kiuj pro la komforto de viaj pli kurtaj vojoj neniam devojiĝis al la tragikaj malbonoj de aliaj homoj. Kiel nun foriris preter nia ĝojo tiu ĉi Pinocchio skulptita el tindro, tiel ili foriras indiferente, tiomfoje — ankaŭ preter la zorgoj de la mondo. Kiel pro li povas degeli la amo fariĝinta el neĝo, tiel pro li povis mortaĉi sur la fosaĵbordo la viktimoj de la milito, pro li oni povis bati kapen-cerben senkulpulojn sur la strato. La mondo povas disfali ĉirkaŭ li. Li rapidas hejmen sur la pli kurta vojo. — Ho vi, spanada raŭpo, krizalidiĝinta alarmo, vi, sur nokto-

vazo kaŭranta horizonto. Eble vi ne dormas sur via lito, sed sub via lito vi loĝas hejme sub la tapeto, vi preĝas genuante sub la tablo, vi cirkulas sub trotuar-ŝtonoj: nur vi ne vidas, nur vi ne vidas el la mondo, ke oni ne rimarku vin. Malaperu — sur la plej kurta vojo.

Ni ĵetis neĝbulon post lin kaj ege ridegis pri li. — Venu! Ni ne lasu nin! — Kiel geknaboj ni kuris al la baro sur la angulo. Mi telefonvokis la deĵorantan redaktoron de iu tagĵurnalo.

— Ĝi estas sprita foto sur la unua paĝo. Ne ĉiam nur la neĝoplugilojn! Estas poezie. Kredu al mi. Se vi ĝin vidus!

Oni devas rekoni: ĝentile li volis kredigi al mi, ke mi estas fola. La samon provis ankoraŭ la redakcioj de du tagĵurnaloj. Mi vokis mian konaton, kiu estas konata fotisto de popularaj bildkartoj.

— Ne frenezetu! Nun mi venis hejmen. Mi estas en piĵamo. Cetere mi jam havas cervogregon kaj neĝkovritan ponton. Tiaj!

Oni ne forprenis nian bonhumoron. Des pli ni returniĝis.

— Venu! ni ĝin serĉu! Ĝi devas esti tie. Ĝi revenos.

Ni rekuris al la statuo kaj sekvis la solecan spuron. La spuron de la *skulptisto* en la neĝo. La spuron de tiu homo, kiu de ie venis lace aŭ freŝe, feliĉe aŭ malespere — kaj kiel la solece hejmeniranta homo sonigas fajfon aŭ svingas per la bastonego, haltis por dudek minutoj kaj en la bonhumoro de sia eksonora kaj stentora animo ludeme li knedadis ĉi tie, nur tiel — Jen! Homoj! Ekfajfu! li knedis ĉi tien tian statuon, rideton, grimacon, brakumon je la ŝultro, komplican instigon al ĉiu animo povanta ĝoji, prunton el sia forto-superfluo, pluson el sia bonhumoro — al la aliaj. — Al la aliaj! — kiuj fajfis pri li!

— Sed kiom tio lin ĉagrenigis? Li faris por la aliaj kaj lin ne interesis, ĉu tiuj pretendas ĝin aŭ ne. El interne li sentis la devigon: li devis doni, ĉar li havis el kio doni. Li pensis je aliaj, kiam li disvolvis sian riĉon. Li fariĝis pli riĉa inter tiom da povruloj.

Sed kie vi estas, ludema animo, vi, serioza viro? Kiu vi estas, kien vi iris? vi, vivanta por ni, kiu pensis je ni, je tiuj, kiuj ne zorgis pri vi. Kiu estis donacanto por tiuj, kiuj eĉ ne rimarkis viajn donacojn, kiu kreiĝis por tiuj, kiuj eĉ kompreni ne kapablas vin. Kie vi estas, vi rara, jam-jam mistika estaĵo? Prezentu vin! Voku per telefono! Vi, kiu kreas pro ĝojo de la kreado, pro devigo de la elflua riĉo de la homeco! Kie vi estas en tiu ĉi soleca, luma, brila vintro? Ni serĉas viajn spurojn en la neĝo de la parko, ni esploradas pri ĝi, sed ĝi malaperis. Kien? Ĉu ĝi gvidas en la ĉielon? Ĉu ĝi malaperas en la ĉielo aŭ sur la trotuaro ĝi perdiĝas en la koto? Voku nin per telefono. Donu al ni la telefonnumeron de viaj amikoj. Ĉu vi estas multaj?

Ni demandas frostetante: — ĉu ne, vi ne estas sola?

(„Népszabadság")

Tradukis *Lajos TÁRKONY*

Vilho Setälä: Fortoj de l'vivo

La movado, literaturo originala kaj tradukita, eseoj, la lingvo, scienco kaj tekniko / ilustrita per 120 fotoj kaj desegnaĵoj, 208 paĝoj. Eldonis Fondumo Esperanto, Helsinki 1967.

Tiu ĉi valora libro estas pro multaj kaŭzoj interesa ankaŭ laŭ hungara vidpunkto. Por ni estas proksima ĉio, kio rilatas nian finnan fratnacion, sed aparte se temas pri Esperanto. Krome magistro Vilho Setälä — tre energia pioniro de la finna kaj tutmonda Esperanto-movado, staras proksime al nia koro, jam parte pro sia fama patro Emil Nestor Setälä (1864—1935), kiu sciis perfekte hungare, okupiĝis pri lingvoscienco, precipe finna–ugra, vivis iam inter ni kiel ambasado, ministro de la finna ŝtato, estis honora doktoro de la Universitato en Budapest. Pri li oni povas legi du artikolojn de la filo en la menciita libro. — Mi memoras, ke mi povis paroli kun E. N. Setälä hungare okaze de la sukcesplena kongreso en Helsinki 1922, kiam la fama scienculo diris la festparoladon pri la utilo, neceso kaj uzo de Esperanto. Lia hungara parolo sonis, kvazaŭ li estus veninta el la hungara ebenaĵo.

Sed la tuta volumo eldonita okaze de la 60-jara esperantisteco kaj je la 75-a naskiĝtago de Setälä, membro de la Akademio de Esperanto, enhavas sinsekve ofte gravajn menciojn pri hungaraj esperantistoj kaj reflektore lumigas periodojn de nia landa movado.

*

Post detala priskribo de la grandioza kongreso en Praha en 1921 ni povas legi laŭdan travivaĵon dum la postkongreso en Budapest, aranĝitan kun multaj tiutempaj postmilitaj malfacilaĵoj en parte kontraŭrevolucia atmosfero. Jen aperas karaj nomoj, kiel Elek Tolnai, Miklós Bánó, János Tomán, Sándor Laquer kaj la karesa rimarko: „Ĉio estis unuaklase organizita" ... „regis mallaciga atmosfero" post laciga kongressemajno! Jen aperas unuafoje antaŭ internacia publiko Kalocsay kaj Baghy kun aparta aproba mencio de la modesta teatra vespero.

Laŭvorte ni legas poste raporton pri la glora kongreso en Helsinki — kiun ĉefe Setälä aranĝis — kie kulmino estis la persona apero de Kalocsay deklamanta la famiĝintan Kongresan Runon ĉe la malfermo, kies plena teksto aperas meze de la raporto. Li devis ripeti la runon antaŭ la ŝtatprezidanto, kiam tiu solene gastigis la ĉefajn delegitojn kaj li festparolis ĉe monumento de Runeberg.

Ni povas legi ankaŭ pri Szilágyi kaj la interesan recenzon pri la libro de Szathmári: Kazohinio. Inter la multaj fotorepresoj — grandparte originalaĵoj de fotovirtuozo Setälä! — kelkfoje ni ekvidas la konatajn hungarajn vizaĝojn.

La diversaj priskriboj, raportoj, eseoj pri niaj movadaj kaj lingvaj problemoj, originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj, biografioj, scienco: ĉio entute prezentas vivoverkon studindan kaj konindan por ni hungaroj kaj por ĉiu esperantisto, kiun interesas la diversaj facetoj de nia movado, ĝia historio kaj la nobla figuro de eminenta esperantisto!

P. Balkányi

GILGAMEŜ:
La morto de Enkidu

VIII. TABULO.

Ĉe l'unua bril' de tagiĝo Gilgameŝ
iris al la kuŝej', de amiko sia.
Tiu ĉi kuŝis tie silente,
fluis softe la spiro anima,
fluis softe el lia buŝo.
Lin rigardis Gilgameŝ kaj ploris.
Lin rigardis kaj parolis Gilgameŝ:
„Enkidu, do kie estas via forto,
kie jam via voĉo, amiko mia?
Kiel taŭro sovaĝa estis vi,
forta kiel la leono estis vi,
kaj rapida kiel la gazelo.
Kaj mi vin amis kiel fraton, vin,
super princoj granda mi vin faris, vin,
kaj ĉiu bela virino en Uruk
por vi flamis kaj vin amis, vin.
Kun vi mi iris al la cedrarbaro,
kun vi mi estis tage-nokte,
kun vi mi portis al urbo Uruk
la tranĉitan kapon de Humbabo,
tiel ke la montaranoj zorgprematai
saviĝintaj jam de ĉi ega plago.
ĉiam diros nian nomon bene.
Ni mortbatis komunlukte
la sorĉtaŭron furiozan de l'ĉielo.
Ĉu do vin tiu monstro trafis murde
per venena haladzo faŭka?
Ĉu al ni la grandaj dioj ne pardonis,
ke nin kaptis kolerego kontraŭ Iŝtar,
kaj ni murdis komunlukte
tiun taŭron alsenditan de l' ĉielo?"

Kaj li silente sidis tie unu horon
kaj rigide rigardis malproksimen.
Sidis tie silente Gilgameŝ
kaj denove rigardis al Enkidu.
En silento kuŝis Enkidu.
„Enkidu, amiko kaj amato,
amiko de miaj junaj jaroj!
Jen vi kuŝas, vi, panter' de la stepo,
vi, kapabla je faro plej mirinda,
ĉar ja kune ni iris al la cedrarbaro,
ĉar ja kune ni ĉasis, kune ni murdis
la sorĉtaŭron alsenditan de l'ĉielo
kaj Humbabon, cedrarbare loĝantan.
Kio estas ĉi profunda dormo,
kio ĉi dorma sveno vin premanta?
Vi aspektas tiel morne nun
kaj plu ne aŭdas miajn vortojn."

Sed plu l'okulojn tiu ne levis.
Palpis al li la koron Gilgameŝ,
sed ĝi ne batis, ĝi plu ne batis.
Kaj nun, kiel fianĉinon, per kovrilo,
sian amikon kovris mole Gilgameŝ.

Hurl' eksonis, kiel de leono,
kiel de l'leonino lancopikita!
Hurlas sian vean plendon Gilgameŝ,
elŝiregas al si la harojn,
kaj disŝutas ilin en la vento,
kaj deŝiregas de si la vestojn
kaj surmetas vestojn de funebro.

Kaj ses tagojn kaj ses noktojn ploras
Gilgameŝ pri la amiko kaj amato,
kaj nur je l'sepataga mateniĝo
igas meti la korpon al la tombo.

Je l'sepa tago enterigas Gilgameŝ
la amikon kaj amaton Enkidu,
kaj forkuras el Uruk,
altamura, pacoĉirkaŭata urbo,
kaj rapidegas al la stepo,
kaj tie renkontiĝas kun ĉasisto
kiu fosas kaptokavon por leonoj.
Kaj la ĉasisto parolas al la reĝo
kaj ĉi-vorte sin al li turnas:
„Alta estro, reĝo Gilgameŝ,
vi mortigis cedrarbare la arbariston,
kaj Humbaban mem, de la cedra monto la estron,
kaj leonojn en la ravinoj vi mortigis,
kaj la taŭron mem senditan de l'ĉielo,
kial al vi la vangoj tiel palas,
kial sub aflikt' la vizaĝo magras,
kial al vi do klinita la statur',
kial do vi estas kiel pligrimanto
de lontanaj vojoj?
Kial al vi la vangoj estas bruligitaj
de tagmeza sunardo, de pluvo, de vento,
kial vi en paco-ne-trova vago
tra la stepo rapidas tiel morne?"

Gilgameŝ la buŝon apertis
kaj parolis li kaj diris:
„Kiel al mi la vangoj ja ne palus,
kiel al mi ne kliniĝus la statur',
kiel al mi la koro ne lamentus,
kiel mi ne estus kiel pilgrimanto
de lontanaj vojoj,
kiel mi en paco-ne-trova vago
tra la step' ne rapidus tiel morne?
La amiko ligita al mi firme,
Enkidu, panter' de la stepo,
Enkidu, amiko juna, ĉiopovulo,
ĉar ja kune ni iris al la dia monto,
kaj Humbabon venkis sur la monto cedra,
ĉar ja kune ni kaptis, murdis la sorĉtaŭron,
ĉar leonojn en la ravinoj ni mortigis,
Enkidu, amiko mia, Enkidu,
ĵus trafita estis de l' ĉiuhoma sorto.
Mi ses tagojn kaj ses noktojn ploris,
je la sepa mi igis meti lin en tombon.
Ve, la sorto de l'amiko premas min,
sur mi la sorto de l'amiko pezas.
Jen pro kio sur la stepo mi vagas,
Jen pro kio tiras min la malproksim'.
La amiko plejamata iĝis polvo,
la amiko plejamata iĝis ter',
kiel la argilo iĝis Enkidu,
kiel la argilo, kiel flava kot'.
Ĉu mi same do devos sterni min,
ĉu mi devos same kuŝiĝi por ripozo,
kaj neniam plu releviĝi,
ve, neniam, dum eterno de l'eterno?"

Trad. *K. Kalocsay*

Noto de la Red. Gilgameŝ estas la granda ŝumera-babilona epopeo, kiu estiĝis ĉirkaŭ la mezo de la 3-a jarmilo antaŭ nia era. Ĝi estas la unua konata epopeo de la mondo. Lia ĉefheroo, Gilgameŝ estas la reĝo de la urbo-ŝtato Uruk. Li estas tiel potenca, ke la dioj por lin bridi, kreas al li rivalon en la persono de Enkidu. Ili interluktas, sed poste fariĝas bonaj amikoj, kaj kune faras multajn heroaĵojn. Ili defias la amdiinon Iŝtar, kaj ŝia venĝo estas, ke ŝi mortigas Enkidu-n. — La publikita parto rakontas la konsterniĝon de Gilgameŝ pro la morto de la amiko.

Szilárd BÁLINT:

La sekreto de la riĉiĝo.

En la tuta mondo ĉiu scias, kiu konas min, ke mi estas tute senhara; mia kapo estas tiel glata, kiel la kukurbo.

Tamen mi estus sufiĉe bela viro, se ne mankus al mi la hararo. Pri tio pensante, mi sidis sub la juglandarboj ĉe parencoj en vilaĝo. La vetero estis varma, eĉ dormemiga. Post la abunda tagmanĝo kaj bona vino, mi komforte etendiĝis en ripozlito, tamen mi ne povis ekdormi. Mia penso denove revenis al la kalvaj homoj. Certe multaj homoj havas nudan kapon. Ĉefe la saĝaj, eminentaj viroj. Tiu ĉi stato ne doloras, tamen ĝi estas malagrabla. Mia rigardo vojeraris al la malnova domo. Antaŭ jarcento mia avo konstruigis ĝin, la loĝantoj jam estas la pranepoj.

Subite mi pensis pri tio, ke en la subtegmento troviĝas malnovaj mebloj, libroj kaj aliaj aĉaĵoj. Eble mi trovos inter ili interesaĵojn.

Per helpo de kaduka ŝtupetaro mi surrampis la subtegmento. Silento regis en la malnova ejo. Seka polvo leviĝis kaj ŝvebis kvazaŭ nebulo. Dum la serĉado mi trovis malnovan centjaran libron, kun titolo: „Aŭgura Kalendaro". Mi enrigardis kaj kun konsterno legis la dikajn literojn: „Efika harkreskiga medikamento."

— Mil diabloj! — mi pensis — Tiu libro, laŭjure apartenas al mi, ĉar ankaŭ la avo estas la mia . . . Kiel ŝtelisto mi deglitis sur la ŝtupetaro kaj rapide sidiĝis sur la ripozliton. Singarde mi ĉirkaŭrigardis, estis neniu videbla, nur la varmo oscilis en la aero.

Mi avide legis la tekston kaj la recepton. Sed mi estis suspektema, tial mi iris al mia ĉambro, tie mi elskribis la liston de la herboj kaj poste mi ŝlosis la altvaloran libron en mian kofron.

La edzo de mia nevino estas agronomo kaj li tre miris, kiam mi petis lin, ke li kolektu diversajn herbojn kaj radikojn por mi.

— Ĉu vi estas kreskaĵkolektanto?

Mi diskrete respondis:

— Se oni maljuniĝas, ofte faras kuriozaĵon . . .

— Vi onklo, tute ne estas maljuna, se vi havus harojn, vi certe aspektus kiel junulo!

— Mil diabloj — mi pensis — denove tiu malbeninda senhareco . . .

Mi havis tiom da saĝo, ke nur parton de la listo mi transdonis al la parenco por la kolektado, tamen li tute ne povis kolekti la foliojn de ricino, kvankam laŭ la libro la ricinoleo tute ne estas konvena, nur la ricinfolioj.

Mi ne restadis longe ĉe la bonkoraj gastigantaj parencoj, sed mi vizitis kun miaj trezoroj aliajn vilaĝajn parencojn.

Post semajno la tuta botanika kolekto estis kompleta, kaj mi rapidegis hejmen.

Mia edzino tre koleriĝis, kiam ŝi ekvidis la kofron plenplenan de herbaĉoj, sed tuj sereniĝis, kiam ŝi tralegis la malnovan libron. La sekvan matenon mi kuiris laŭ la instrukcio la miksaĵon, kaj kiel la famaj kuracistoj kaj inventistoj kompreneble mi volis elprovi la panaceon sur mi mem.

Mia edzino atentigis min:

— Paĉjo, ne ŝmirkovru vian tutan kapon, nur unu strion faru sur vian frunton en tia linio, ĝis kie vi volas kreskigi la harojn! Mi obeis. Poste mi enlitiĝis. Matene mi forlavis la ŝmiraĵon kaj denove enŝmiris la saman lokon. Tiamaniere mi manipulis sur mia frunto dum semajno.

Rezulto estis nenio, nur sur la kuseno estiĝis granda neforviŝebla verda makulo.

Mi perdis mian emon. Mia libertempo jam forpasis, tial mi iris labori. Post semajno mia frunto komencis juki laŭlonge de la strio kaj elŝoviĝis tie la krinoj. Densa harostrio estis videbla sur mia frunto. Miaj kolegoj ĉiam ridaĉis, kiam ekvidis min. Iu el ili diris:

— Vi havas tian frizbuklon, kiel Sankta Antonio!

Mi restis hejme dum semajno kaj diligente manipulis mian kapon. Okazis miraklo. Mia hararo densiĝis kaj post monato mia barbiro preskaŭ falis surdorsen, kiam li ekvidis min. Rezultiĝis granda sensacio. Unue mi kreskigis harojn por la direktoro de mia oficejo. Post monato mi promociiĝis kaj ricevis pli grandan salajron.

Al tiu kuracisto-profesoro, kiu skribis artikolon en gazeto, ke mi estas ĉarlatano, mi kreskigis tian frizaĵon, kiun havas laniario.

Malrapide ĉiuj senharaj eminentuloj ricevis de mi harojn, sed la sekreto de la mirakla medikamento restis la mia. Mi ricevis oficialan alvokon, ke la priskribon de la medikamento mi transdonu al la Inventaĵa Oficejo.

Mi silentis kaj transdonis nenion.

En iu tago mi devis iri al la tribunalo. La prokuroro faris akuzon kontraŭ mi, ĉar mi sen kuracista kvalifiko uzas ĉarlatanaĵon. La prokuroro kaj la pledadvokato dum longa tempo disputis. Ĉiuj alvokitaj atestantoj dum la traktado neis la manipulon. La prezidanto de la tribunalo ofte nervoze glatigis sian densan hararon. Fine manke de dokumentoj oni absolvis min. Post la traktado la prezidanto neoficiale, inter kvar okuloj klopodis venki min, por, ke mi transdonu la sekreton al la Inventaĵa Oficejo. Li diris, ke mi ricevos multe da mono kaj mi pensu pri tio, ke sen medikamento la duona lando restos kalva. Fine mi sen pozemo konsentis pri la transdono senpage, sed nur persone al la ŝtatestro, kiu agu kun la medikamento laŭvole.

Dum la solena transdono en la parlamentejo mi estis nomumita: direktoro de Ŝtata Harkreskig-Instituto. La nova moderna palaco havis pli ol 1000 litojn. La ĉefkuracisto, kiu nomis min en la gazeto ĉarlatano, ĉiumatene profunde kliniĝante raportis al mi pri la kreskado de la haroj de la homaro.

Post kelkaj tagoj la tuta lando prepariĝadis por granda solenaĵo. Sur la domoj flagris flagoj. La ŝtatestro kaj mi en malfermita aŭto iris tra la granda bulvardo, inter ovacioj de la amaso, kiam abrupte iu komencis ektiregi mian ŝultron. Ekkoleriĝinte mi returniĝis kaj ekvidis mian parencon, la agronomon, kiu en la korto sub la juglandarboj vekadis min.

Gape mi rigardis lin. Mia unua rigardo vagis al kaduka ŝtupetaro ne bone videbla ĉe enirejo de la subtegmento. Dormeme mi demandis, montrante:

— Ĉu la ŝtupetaro perdiĝis?

— Ne, ĝi rompiĝis kaj la veturilfaristo forportis ĝin por ripari . . . — Kara onklo, vi dormis profunde, sed mi petas bonvolu veni jam vespermanĝi.

Mi reflekse karesis laŭlonge mian glatan kapon, kie en tiu momento sledis malsupren iu rampanta muŝo.

SIMPTOMOJ DE LA MALJUNIĜO

Sporthigiena profesoro de la Universitato de Michigan diris:

— Kiu en la ĵurnalo unue serĉadas la rubrikon de la mortintoj kaj nur poste la sportrubrikon; kiu en la restoracio spektadas unue la manĝokarton kaj nur poste la belan kelnerinon — tiu estas maljunulo.

GLASO POR MEKSIKO

Heins Groeters, la bierspilanto de la restoracio „Dom" en Köln enkondukis novan mezurilon. De kelka tempo li ja porciumas la bieron „en glaso de Meksiko", kiu estas iom malpli ol la normala, sed la prezoj estas egalaj. Tiu ĉi „antaŭvida" homo jen motivas sian agadon:

— Mi nepre volas viziti en 1968 la Olimpion en Meksiko, kaj la bileton por la flugmaŝino mi volas aĉeti per la prezdiferenco.

Paŭlo BALKÁNYI

ANDERSEN EN HUNGARUJO

Se oni provus mezuri en nia lando la popularecon de la diverslandaj fabelverkistoj, verŝajne Andersen, tiu dana gigantulo ricevus la unuan lokon. Kvankam la hungara popolo havas mem tre riĉan propran fabeltrezoron — el kiu multo estas kompreneble transprenita el la fabeloj de najbaraj kaj eĉ el maproksimaj popoloj —, kvankam oni bone konas la plej famajn fabelistojn de la mondliteraturo, kiel Ezopo, La Fontaine, Grimm kaj aliajn, Andersen forte enradikiĝis en la koro de la hungaroj. Kaj tion li plene meritis. Ja liaj fabeloj estas ne nur por la infanoj, ofte eĉ ĉefe ne por ili, sed amuzas, distras kaj instruas ankaŭ la plenaĝulojn.

Menciinde estas, ke se dum ia serioza pritraktado iu provas ŝovi la aferon al ia flanka trako, se oni provas ion nebule klarigi aŭ prezenti pri la afero ian ne tute akcepteblan klarigon, hungara kutima rifuzo estas: „Fabelo jam ne estas! Andersen mortis!" Vere li estas unu el la plej konataj mondliteraturaj nomoj en nia malgranda lando. Kaj multaj konataj hungaraj verkistoj, poetoj, artistoj nomas lin en la vico de siaj plej ŝatataj verkistoj. Ekzemple Zseni Várnai poetino deklaris, ke la fabeloj de Andersen jam en ŝia infanaĝo komencis influi, formi ŝian animon. Konata poeto Mihály Babits rakontis, ke li rifuzis, kiel knabo, la fabelojn, sed dum siaj plenaĝaj jaroj li despli multe interesiĝis kaj legadis ilin. Fama eseisto kaj kritikisto konstatis, ke Andersen skribis laŭ la ekstera formo la fabelojn al infanoj, sed la enhavo ĉefe alparolas la plenaĝulojn.

Andersen havis rektajn personajn kontaktojn kun Hungarlando, li mem vizitis ĝin kaj inter liaj hungaraj konatoj estis la fama politikisto, gvidanto, reformisto kaj kreanto: grafo István Széchenyi, ministro komence de la revoluciaj tempoj de 1848—49 kaj la mondfama muzikisto Ferenc Liszt.

Jes, liaj fabeloj trovis relative frue vojon al la hungara lingvo, al la hungaraj koroj. Jam en 1858 aperis la unua kolekto el liaj verkoj en traduko de Julia Szendrey kaj en tiu estis partoj, kiuj influis la kreon de la fama hungara drampoemo „La tragedio de l'homo". La Andersen-domo en Odense eldonas volumojn sub la nomo Anderseniana kaj en ties VI-a volumo el la jaro 1966 tri foliojn ampleksas la studo de hungara akademiano Imre Trencsényi-Waldapfel pri la rilatoj de Andersen kun Hungarlando. En tiu la scienculo detale analizas la similajn kaj la diferencajn trajtojn de la Andersena dramo Ahasverus kaj de la drama poemo de Madách. Li eĉ subtenas siajn asertojn per citaĵoj. Li akcentas, ke la baza penso de ambaŭ verkoj estas la progreso de la homaro kaj Madách — krom sia nediskutebla genio kaj memstareco povas ankaŭ multon danki al la nomita dramo de Andersen. Laŭ li tio estas konsiderinda fakto de la literaturhistorio. La hungara akademiano asertas ankaŭ tion, ke la dana geniulo parte per siaj travivaĵoj kaj spertoj en Hungarujo, parte per siaj legaĵoj ekkonis kaj adoptis en sian fabelmondon ankaŭ hungarajn motivojn.

La poezia trezoro de Andersen ĉiam pli profunde penetris en la hungaran popolvivon. Ĝia popularecо konstante kreskas. Liaj fabeloj atingis jam pli ol kvindek hungarajn eldonojn kaj multaj aperis, ankaŭ traverkite, riĉe ilustrite por infanoj kaj por plenaĝuloj, ĉu plene, ĉu elektitaj. Mi mem posedas kvin volumojn kun ĉiuj fabeloj en bele binditaj, arte ilustritaj volumoj. En la popularigo havas grandan rolon ankaŭ la teatra arto, ekzemple „La nova vesto de la imperiestro" sukcese kaptis la publikon sub alia titolo en la hungara Operdomo en Budapest kun alloga, bela, populara muziko de komponisto György Ránki.

La hungaraj infanoj ofte ĝuas la radioprezentadojn lerte preparitajn el la plej konataj Andersenfabeloj kaj al tio inde aliĝas la similaj artaj prezentadoj de la Hungara Ŝtata Pupteatro. Ekzemple kiel siluetludon kun bela muzikakompano la rakonton pri la malbela anaso kaj kiel turnriĉan, vastigitan fabelludon „La sorĉan Fajrigilon", kiun la esperante sciantaj geaktoroj de la nomita teatro tiel sukcese kaj alloge prezentis kelkfoje dum la Kongreso en Budapest ankaŭ en la internacia lingvo.

Jes, por konigi la mondfamajn fabelojn inde kontribuis ilia esperantvesta disvastigo. Ne estas hazardo, ke mem Zamenhof atentis tiun nordan majstron kaj li dediĉis sian forton kaj sian laboron por donaci la tradukon de la plena verkaro al la esperantistaro. Sed ankaŭ aliaj novaj interpretoj de kelkaj belaj fabeloj, aperintaj en la lastaj jaroj kun belaj ilustraĵoj en Danlando, atingis la hungaran esperantistaron kaj pruvis la kulturvaloron de la internacia lingvo kaj la indan honorigon de la dana mondliteraturisto. Tion honoris ankaŭ en la jaro 1955, okaze la centjara datreveno de la naskiĝo de Andersen nia lando, kiam ĝi feste partoprenis en la memorigaj festoj proponitaj tutmonde de la Pac-Mondkonsilantaro. Oni prelegis kelkfoje pri Andersen ankaŭ en la esperantaj grupkunvenoj. Tiam aperis novaj tradukoj, novaj eldonoj. Kaj dum la pli ol dek jaroj sekvantaj tiun datrevenon la triumfa vojo de la Andersena fabelmondo, lia imagovekanta, humana edukado, lia nobla animo plu vivas en la nova generacio por ĝui ĝin, por lerni el ĝi, por konservi ĝin kaj por pludoni al niaj gefiloj.

HO!...

Ni Ĉi-ĉin, la ĉina altosaltisto atingis 227 cm-an rezulton, kiu estis nur unu cm-on malpli ol la mondrekordo de Brumel. La ĉina atleto jene diris sian opinion:

— Se miaj saltoj estus tiel altaj, kiel la pensoj de prezidanto Mao, mi povus mezuri la salto-laton nur per ŝtupetaro de la fajrobrigadistoj.

KION ILI LERNIS?

Nova trejnisto komencis labori ĉe provinca sportasocio. La tuta urbo atendis ekscite lian „debuton". Post la unua matĉo multaj zelotoj staris ĉirkaŭ la futbalistoj kaj demandis ilin:

— Nu, kion vi lernis de la nova majstro?

— Unue kelkajn tute novajn esprimojn — ili respondis.

Univ. prof. Lajos KOVÁCS:

La bazaltvulkanoj de la Balatonregiono kiel atestantoj

La plej granda lago de Hungarlando, kaj samtempe ankaŭ de Mezeŭropo, estas Balatono, kiun oni kutimas nomi ankaŭ „Hungara maro". La suda bordregiono de Balatono estas ĝenerale plata, sed ĝia norda bordregiono montras pentrindan bildon per ĝiaj belaj, milde etendiĝantaj, verdantaj montoj kaj elstarantaj vulkankonusoj (1. fig.).

Hodiaŭ la ĉarma onda surfaco de la Balatonregiono ĝojigas nin kaj ni plezuras — percipe en vermega somero — ĉe la agrablaj ondoj de la akvo de Balatono. Sed tie, kien la blua spegulo de Balatono altiras tiom multe da homoj, multajn eĉ el foraj landoj, antaŭ 5—11 milionoj da jaroj ekzistis nek Balatono, nek ĝia verdanta bordregiono. Ankaŭ la pentrindaj vulkankonusoj mankis, eĉ la homo ne vivis ankoraŭ tiam.

En la nova erao de la terhistorio, ĉe la fino de la terciara periodo, en la pli frua fazo de la tiel nomata plioceno, la vastega lago Pannonia *kovris la teritorion de nia lando. La unuecan karakteron de la larĝa lago Pannonia, ondanta interne de la krono de Karpatoj, interrompis multnombraj insuloj, precipe laŭlonge de la iamaj bordlinioj tuŝantaj la ĉirkaŭantajn montregionojn. Ankaŭ multaj plimalpli grandaj golfoj, duoninsuloj pliigis ankoraŭ ilian variecon. Ankaŭ la Transdanuba parto de la lago Pannonia estis dismembrigita per insuloj, kiujn formis la elstarantaj amasoj de la* Mecsek-*montaro,* Villányi-*montaro kaj de la* Transdanuba-mezmontaro

La kontakto inter la lago Pannonia kaj la ĉiam pli atrofiinta kaj retiriĝinta (regresinta) maro ĉesis en la fino de la miocenepoko, senpere anticipinta la pliocenon. Ĉi tio okazis ĉirkaŭ antaŭ 11 milionoj da jaroj. Ekde tiu tempo ni parolas pri la lago Pannonia kiu estis ĉe ni la restaĵo de la atrofiĝinta terciara maro. Sed komence de la plioceno la basenfundo komencis intense sinki kaj la ondoj de la lago Pannonia forglutis pli kaj pli novajn detalojn de la jam elstarintaj, sed nun denove sinkintaj terpartoj.

Malgraŭ la rapida sinko la profundecorilatoj de la lago Pannonia restis malprofundaj partoj, ĉar la surfundiĝo de la sedimentamasoj, portitaj en la basenon, povis egaligi la rapidan sinkadon de la basenfundo. Samtempe ĉi tio ebligis la akumuliĝon de dikegaj sedimenttavoloj, kiuj kelkloke — laŭ la indikoj de diversaj profundboroj — atingas ankaŭ la 2000 metran dikecon. Ĉi tiu dika tavolserio reprezentas la suban parton de la plioceno, la tiel nomatan pannonian etaĝon.

La pannonian tavolgrupon enkondukas grandgrajna gruzkonglomerato, kiu indikas la iaman bordgarnaĵon kaj spegulas la detruan laboron de la transgresantaj, ondofrapantaj akvomasoj. Poste jam demetiĝis pli fajngrajnaj sedimentoj, gruza sablo, sablo kun pli grandaj, poste kun pli fajnaj grajnoj, ilin sekvas malkompaktaj sablotavoloj kaj estiĝis sabla argilo kaj puraj argiltavoloj.

En la laŭgrade dolĉiĝinta, ankoraŭ duonsala akvo de la lago Pannonia vivis multspecaj konkoj kaj helikoj, kies skeletrestaĵojn, post ilia neniiĝo ekkovris la sablo aŭ la ŝlimo de la basenfundo, kiel ni povas observi ĉi tiun procedon ankaŭ hodiaŭ en la okazo de la konkoj kaj helikoj, kiuj en la Balatono vivas. Tiaj skeletrestaĵoj kiel fosilioj povas esti retrovataj hodiaŭ en la menciitaj pannoniaj tavoloj. Tiaj estis la Congeria-konkoj, kies kalkaj krustoj similas al la kaproungo; el iliaj pluraj specoj estas plej konata la „Balatona kaproungo" — laŭ paleontologia nomo Congeria ungula caprae — kies kalkajn krustojn la ondofrapado de Balatono ankaŭ hodiaŭ ellavas el la argilaj pannoniaj tavoloj. Ĉi tiu konko vivis en la pli juna parto de la pannonia-epoko, kiam la akvo de la lago Pannonia jam tute dolĉiĝis. Pri tio rememoras ankaŭ la bone konata legendo de la Balatonaj kaproungoj (Hungara Vivo, 1965. 4. p. 11.).

Alia ofta konkospeco estas la per ripa kalka krusto karakteri-



Estingiĝintaj bazaltvulkanoj sur la bordo de Balaton, el la direkto de Balatonfenyves. Kontraŭ ni estas la Badacsony; pli malproksime de la bordo, dekstre la malgranda bazaltkonuso estas la Tóti-monto, maldekstre la amaso de la Szentgyörgymonto.

zata Limnocardium *(2. fig.), kies malgrandstaturaj specoj vivis en la pli frua fazo de la pannonia-epoko, sed ĝiaj grandstaturaj specoj vivis poste. El la helikoj la specoj de* Melanopsis *estis disvastiĝintaj ĝenerale en la pli frua fazo de la pannonia-epoko; el ili estas precipe bone konata kaj ofta la sufiĉe grandstatura* Melanopsis martiniana.

En la fino de la pannonia-epoko la surfundiĝintaj sedimentamasoj plenigis la basenon de la lago Pannonia, kies plia sinko ankaŭ ĉesis. Ĝiaj plej junaj sedimentoj montras sin ĉiam pli sablozaj kaj poste transiras en malkompaktajn sablotavolojn. Ili ja ne estas jam la demetaĵoj de la lago Pannonia, sed riveroj kunportis kaj demetis ilin. Ĉi tiuj de riveroj portitaj sablotavoloj laŭ tempe jam transiras al la pli juna fazo de la plioceno, al la levantea-epoko.

Kiam la lago Pannonia malaperis, ĉe la fino de la pannonia-epoko, okazis specialaj eventoj. Parton de la teritorio, kiun pli frue regis la akvo, nun ekposedis la fajro. Unu vulkano post la alia eruptis kaj iliaj inkandeskaj lafoamasoj disfluis sur la pli frue demetiĝintaj pannoniaj tavoloj. La malvarmiĝo kaj la rigidiĝo de la fajraj lafoamasoj poste rezultigis nigran bazalton. La ripetiĝintaj vulkanaj erupcioj sur la norda bordregiono de la hodiaŭa Balatono kaj sur la sudorienta rando de la Malgrandebenaĵo (nordokcidenta parto de Hungarlando) transiris ankaŭ al la komenco de la pli juna fazo de la plioceno, de la levantea-epoko, eĉ daŭris ĝis la fino de la plioceno (3. fig.).

Ĉi tiam ĝustadire regis jam kontinentaj cirkonstancoj sur la loko de la malaperinta lago Pannonia kaj la serio de la iamaj insuloj, nun jam kiel kohera komplekso de la Transdanubia mezmontaro, elstaris el la sedimentkovrita teritorio de la iama



Limnocardium secans.

baseno de la lago Pannonia, — kvankam ne tiel alte, kiel alte situas la hodiaŭa surfaco de la mezmontaro. Al ĉi tio aliĝis ankaŭ la hodiaŭa Malgrandebenaĵo, kies surfaco tiam ankoraŭ estis pli alta, ol hodiaŭ. Sed la Balatono en tiu tempo ankoraŭ ne ekzistis.

En la levantea-epoko fariĝis pli grava la laboro de la konstantaj ventoj blovantaj el la nordnordokcidenta direkto kaj ĉiam pli fortiĝantaj, kiun ankaŭ la detrua laboro de la pluvakvo pliigis. Ili per kuna forto ekatakis la malkompaktajn pannoniajn tavolojn, kiuj kovris la tiaman surfacon, kaj baldaŭ estigis kavojn sur la surfaco kun ĉiam pli grandaj dimensioj. Tiuj vento- kaj akvoŝiritaj surfacaj kavoj ĉiam pli kuniĝis unu kun la alia, kaj per ilia kreskado la pannonia surfaco fariĝis ĉiam pli malalta.

Sed sur la lokoj de la vulkanaj erupcioj haltis la detrua laboro de la vento kaj pluvakvo, ĉar ĝi renkontis la reziston de la dura bazalto. Kie la bazalto kovris la malkompaktajn pannoniajn tavolojn, tie ĝi ankaŭ defendis ilin kontraŭ la detruo de la vento kaj pluvakvo; kaj kiomgrade la pannonia surfaco fariĝis ĉiam pli malalta en la ĉirkaŭaĵo de la bazalterupcioj, tiomgrade leviĝis ĉiam pli alten — apartigitaj unuj de la aliaj — tiuj restaĵoj de la pannoniaj tavoloj, kiujn kovris kaj ŝirmis la bazaltamaso. Ili estas tiuj bazaltvulkanoj, kiuj estas konataj parte tuj sur la bordo de Balatono, kiel Badacsony, Szigliget, *parte pli interne, kiel* Gulács, Szentgyörgy-monto, Csobánc, Haláp, Tátika, *aŭ pli proksime sur la rando de la Malgrandebenaĵo, kiel* Kab-monto, Somló *estas konataj*

Surbaze de la diritaj estas evidente, ke la bazalto formas nur la supron de ĉi tiuj montoj, la trunkon mem konstruas la gruzeraj, sablaj, argilaj pannoniaj tavoloj, en kiuj oni povas retrovi ankaŭ la menciitajn konko- kaj helikorestaĵojn. Ĉi tiuj duspecaj formacioj estas bone distingeblaj unu de la alia ankaŭ laŭ la konturo de tiuj montoj, ĉar la montoflankoj konstruitaj el la pannoniaj tavoloj estas relative pli milddeklivaj kaj vinberkulturoj kovras ilin, dum la ĉapforme loksidiĝantaj bazaltmasoj kun krutaj flankoj elstaras sur la supro. La konturo de la montoj ĉe la renkontiĝo de la du specoj de formacioj montras observeblan rompon (4. fig.). Se tiujn rompopunktojn de ĉiuj vulkanoj per



La bazaltvulkanoj rigardataj de sur flugmaŝino. Maldekstre la sudorienta deklivo de Badacsony kaj ĝia el bazalto konsistanta, per arbaro kovrata supro. Dekstre de tio la konuso de Gulács kaj en unu linio kun ĝi dekstre la pli malalta konuso de Tóti-monto. En la fora fono estas videbla, dekstre de Gulács, la monto Csobánc.

imagaj linioj, pli ĝuste per imaga surfaco kunligante, ni superpontus la interan spacon, ni ricevus la originalan altecon de la surfaco detruita de post la pannonia-epoko, de tiu surfaco, pri kiu atestas ĝuste tiuj bazaltvulkanoj. Ĉi tiajn montojn oni kutimas nomi „atestomontoj" en la geologio.

La veraj atestomontoj etendiĝas sur la dezertaj teritorioj de Interna Azio, kie en la elformiĝo de la surfaca morfologio la vento estas preskaŭ ekskluziva forto. En hejmlanda rilato la balatonregionaj bazaltvulkanoj donas la plej belajn ekzemplojn de la atestomonto, kvankam en ilia elformiĝo ankaŭ la kondensakvoj havis tre gravan rolon.

La bazaltvulkanoj funkciintaj ĉirkaŭ dum kvar milionoj da jaroj je la fino de la levantea-epoko estingiĝis, sed la karaktero de la pejzaĝo, kiun ili difinis, komencis burĝoni tiam, kiam ankaŭ la praulo de Balatono naskiĝis. Tio okazis antaŭ 600.000 jaroj, en la pli frua parto de la pleistoceno, kiam estiĝis fosaĵaj krustorompoj, kiuj trastrekas la pannoniajn tavolojn. La sinko, disvolviĝinta laŭlonge de tiuj rompiĝoj, kreis pli da malprofundaj basenoj, apartigitaj unuj de la aliaj, ĉe la sudorienta flanko de la Transdanubia-mezmontaro. Poste la falinta kaj defluinta akvo, krome riveretoj, iom post iom plenigis ilin per akvo. La kunfandiĝo de ĉi tiuj komence memstaraj, poste en ilia etendiĝo daŭre pligrandiĝintaj lagobasenoj estigis la hodiaŭan Balatonon en la fino de la pleistoceno, ĉirkaŭ antaŭ 20.000 jaroj.

Ĉe la naskiĝo kaj elformiĝo de Balatono estis jam atestanto ankaŭ la prahomo, kiu aperis tiel same en la pli frua parto de la pleistoceno. Sed hodiaŭ jam la beleco de Balatono, respegulanta la bordlinion garnitan de mildaj montoj kaj bazaltvulkanoj, ĝojigas la homon de l'hodiaŭo, kiu serĉas ripozon kaj refreŝiĝon borde de tiu mirinde bela lago.



En la konturo de la bazaltvulkano estas bone distingeblaj la milddeklivaj pannontavoloj kaj la bazaltkovrilo finiĝantaj per krutaj flankoj. La geologia profilo de la bazaltvulkanoj: Badacsony (B) kaj Gulács (G). 1. Pannontavoloj, 2. bazalttufo, 3. bazalto, 4. skoria bazalto.

KORESPONDI DEZIRAS

Kvar italaj knabinoj kor. kun ĉiuj landoj: 13-jara Teresa *Anastasio*, Piazza Medaglie d' Oro 35, NAPOLI; 13-jara Adriana de *Falco*, Via Acitillo 66, NAPOLI; 15-jara Annamaria *Senese*, Via Giuseppe Orsi 4/B, NAPOLI; 12-jara Claudia *Proietti*, Via Felice Cavalotti 119, ROMA.

38-jara Peter *Ganev*, ul. D. Todorov 5, GABROVO, Bulgario, kor. kun hungaroj.

28-jara librotenisto serĉas geamikojn en la tuta mondo. Erzsébet *Dálnoki*, ST. GHEORGHE, Lenin 117. Reg. Braŝov, Rumanio.

Nia E-societo organizas ekspozicion: „E en la mondo". Bv. sendi al ni E-aĵojn kaj BK. Rekompenco: E-aĵoj aŭ bulgaraj gazetoj. Esperanto-Societo „Supreniro", v. PAVEL-BANJO, dist. Stara Zagorze, Bulgario.

Inĝ. Stan. *Przybylak*, ul. Wyzwolenia 35/37. bl. 33. PIOTRKÓWTRYB, woj. Lodzkie, Pollando, kor. kun seriozaj ges-anoj, int. PM, BK.

22-jara tajpistino kor. pri diversaj temoj. Jolán *Józsi*, S-ta 23 August Nr 10, ODORHEI, Rumanio.

Joseph *Gonsiorovschi*, ul. Zeglarska 27. m. 8. TORUN, Pollando, int. BK kun loĝantoj de ĉefurboj. Mia kuzo — serioza filatelisto — int. PM.

Marian *Junkiewicz*, 26-jara oficisto de internacia ekspeda entrepreno kor. pri turismo, literaturo, vivo en aliaj landoj. WROCZLAW, str. Kluczborska 15/9. Pollando.

Eduard *Nurmsalu*, RAKVERE, Komsomoli 33-2, Estonio, USSR, int. BK kun ĉiuj landoj.

22-jara Maja *Latipova*, Karpinski 57—2, PERM 22, USSR, kor. pri ĉiuj temoj.

38-jara ekonomo Stojĉo *Cankov*, str. Balgarska 5. RUSE, Bulgario, kor.pri literaturo, int. BK, E-aĵoj ktp.

17-jara lernanto Johano *Vajda*, str. Dupa Iniste 44, BRASOV, Rumanio, kor. pri e-istaj, junularaj k. a. temoj, int. BK k PM.

Dekok diversaĝaj e-istoj (staciestro, jura konsilanto, apotekisto, kuracisto, pedagogo, agronomo, seruristo, tornisto, katolika pastro, lignaĵisto, gestudentoj, oficistinoj, urbo-sekretario) kor. kun ĉiuj landoj. Adreso: d-ro Stefano *Tóth*, sekr. de la Esperantogrupo, KISTELEK, Bocskay u. 10. Lin oni informu pri la specialaj deziroj.

Deknaŭ membroj (17—30-jaraj) de Rondo de Pola Esperanto-Asocio ĉe la MOK, str. Odrozenia 32, LUBIN, Vojevodejo Wroclaw, Pollando, kor. kun hungaroj.

19-jara lernantino de Ekonomia Teknikumo Gabriela *Sobozak*, ul. Józefowska 23, KATOWICZE, Pollando, kor. pri moderna muziko, int. BK, PM, fotojn de artistoj.

Geedzoj Hannelore kaj Diethardt *Sommer*, 8809 OLBERSDORF, Hagelsburg 7, DDR, kor. kun ĉiuj landoj

24-jara fridiga teknikisto Genĉo *Ganĉev*, POPOVO, (Targoviŝko), str. Vazraĵ dane 29. kor. kun ĉiuj landoj.

22-jara belarta instruistino Marina *Valente*, Via Saverio Altamura 13, Parco Vittoria, NAPOLI, kor. pri artaj temoj.

B. D. *Dombrovski*, KRASNODAR, poŝtkesto 147, Sovetunio, kor. kun ĉiuj landoj.

Albinas *Valinskas* (19-jara) serĉas partnerojn en la tuta mondo (krom USSR) por int. PM. Skribu E-e, germane kaj ruse. VILNIUS 31, Poste restante, Litovio, USSR.

Wlodzimezs *Kopezynski*, JAWORYNA Slastea, ul. 1. Maja 20. Pollando, kor. kun 25—30-jaruloj.

DUNAI VASMŰ kaj mallonga historio de la hungara fero-metalurgio



La uzinpartoj en la antaŭaĵo, sed ankaŭ en la fono apartenas ĉiuj al Dunai Vasmű. Foto de HTA (MTI)

La historio de prilaborado de fererco komenciĝis antaŭ pli ol 2500 jaroj sur la teritorio de la nuna Hungarlando. Laŭ la arkeologiaj malkovraĵoj oni okupiĝis jam dum la tempo de patrujokupo pri fero-metalurgio en la okcidenta kaj norda partoj de la lando. Ĉi tion pruvas la malkovritaj ferfandejoj el la 10—11a jarcentoj en la departementoj Borsod kaj Vas. La nomo de ĉi lasta departemento signifas Esperante: fero.

Ankaŭ la plimulto de la nuntempaj uzinoj havas bonfaman pasintecon. La plej malnova ferprodukta fabriko estis fondita de Henrik Fazola en 1770 sub la nomo: Ferfabriko Diósgyőr-Hámor.

La Ferercprilabora Asocio, fondita en 1845, estigis la Uzinon de Ózd. Oni fondis la uzinon cele de plua prilaborado kaj laminatado de ferblokoj por produkti relojn bezonatajn por la fervojoj en la tiutempa Hungarujo. La dua celo estis, ke Ózd helpu la pli kaj pli forte evoluantan industrion enlandan per maldika ferlado, krome per fajnaj kaj krudaj produktoj.

En 1861 la direkcio de la ferfabriko Ózd decidis establi en Borsodnádasd novan ferfabrikon por produkti fajnajn stangferojn, dikajn kaj maldikajn ladojn. La hodiaŭa nomo de la ferfabriko estas Ladfabriko de Borsodnádasd.

Sed la ekzistantaj ferfabrikoj ne plu povis kontentigi la bezonojn de la prosperanta fervojkonstruado kaj la ferajbezonon de la maŝinindustrio. Tiel komencis la hungara ŝtato en 1868 konstruadon de nova moderna ferfabriko. Ĉi tiu ferproduktejo havas hodiaŭ la nomon: Uzinoj „Lenin". Samtempe estis fondita la Ferrafina Asocio en Salgótarján. Ĝia hodiaŭa nomo estas Fabriko de Ŝtalvaroj.

Oni komencis en 1879 la uzinan ŝtalproduktadon en unu el la hungaraj ferproduktejoj, en la fabriko de Diósgyőr per la instalado de fornegoj Siemens-Martin; en 1882 oni establis la ŝtalfabrikparton Bessemer. En Salgótarján oni enkondukis la ŝtalproduktadon laŭ Thomas. Poste oni transiris al ŝtalfabrikado laŭ la metodo de Siemens-Martin. — En 1911 okazis per konstruado de elektra fornego la plievoluigo de moderna ŝtalfabriko en Diósgyőr. Por certigi ferosilicion por la grandaj ŝtalfabrikoj estiĝis en 1937 nova fabriko en Zagyvaróna.

Dum la dua mondmilito ankaŭ la hungaraj metalurgiaj fabrikoj treege damaĝiĝis. Post la Liberiĝo de la lando en 1945 la entuziasmo kaj vivovolo de gelaboristoj de la hungaraj metalurgiaj entreprenoj faris funkcikapablaj la detruitajn fabrikojn kaj la paca produkta laboro povis komenciĝi.

Post la alŝtatigo, en la kadro de la tri- kaj kvinjara planoj, estis modernigitaj niaj uzinoj kaj la elmodiĝintaj maŝinaroj estis ŝanĝitaj je modernaj.

En la fabriko de Diósgyőr, okaze de ĝia rekonstruado necesiĝis transloki laminatejon por dikaj ladoj kaj tiel en 1950 ĉi fabrikparto translokiĝis al Budapeŝto. La laminatejo funkciis ĝis 1962 kiel nova memstara fabriko kaj de tiam ĝi apartenas al Dunai Vasmű.

Post la Liberiĝo la hungara registaro decidis je fino de 1949 pri konstruo de nova ferproduktejo en Dunapentele. Do, ĉi tie konstruiĝis la nova socialisma urbo kaj uzino komence de 1950 kaj funkcias en Dunaújváros sub la nomo: Dunai Vasmű (Danuba Feruzino). Tiam ankoraŭ kredis malmultaj, ke sude de la nekonata transdanuba vilaĝo Pentele estiĝos konsiderinda industria urbo, kiu fariĝos grava faktoro de la ekonomia vivo de nia lando.

La unuaj ekspertoj alvenis, kaj en printempo de 1950 komenciĝis rulbruego de la maŝinoj sur la kota altebenaĵo de Pentele. La heroa epoko de la konstruado komenciĝis. Oni devis batali kontraŭ multe da malhelpaĵoj. Sed post la forpasintaj 17 jaroj ni povas diri, ke la vivo pravigis la progresemajn fortojn, la laboristojn. Ĝi pravigis la inĝenieron

La Danuba haveno de Dunai Vasmű, kie alvenas i. a. la fererco. Fotoservo de Hungara Telegrafa Agentejo (HTA).



Ankaŭ la spirale velditaj tuboj apartenas al la produktoj de Dunai Vasmű. Foto de HTA.

eltenintan en koto kaj frosto, kiu planadis aŭ direktis laŭ neceso. Ĝi pravigis la kuraciston, kiu entreprenis la plej malfacilajn cirkonstancojn, kiam li komencis kuraci. La vivo pravigis ĉiujn, kiuj venis ĉi tien, ĉar ili volis partopreni en iu grandioza nova afero, kiu estas nomita: socialisma urbokonstruo.

La lokumo de la uzina kombinumo kaj urbo estas instrua ekzemplo de la urbokonstruado. Sur la altebenaĵo de Pentele la reganta ventoblovado estas nord–suda. La uzino estas konstruita sude de la urbo, tiel do la naturaj faktoroj servas la aerpurigadon de la urbo. — La saman celon servas la preskaŭ kilometron larĝa ŝirma arbarostrio, plantita inter la urbo kaj uzino.

Malantaŭ la verda arbarostrio subite aperas antaŭ niaj okuloj la ĉefa enirejo de Dunai Vasmű. Sur la fasado de la direkcia konstruaĵo vidiĝas granddimensia fresko de Endre Domanovszky, prezentanta la laboristan-agrikulturistan kunlaboron.

Pia enprofundiĝo kaptas ĉi tie la homojn, kiam ili transpasas la pordegon. Ĝi estas instinkta sinklino antaŭ la homa scio kaj volo, antaŭ tiu persista laboro, kiu sorĉis ĉi tien — en la mezon de la iamaj maizokampoj — ĉi ferkoran giganton. — Ankaŭ en la uzino estas parkoj kaj larĝaj vastaj vojoj, garnitaj per verda greso, sed — iaspeca konstanta obtuza rulbruego vibradas en la aero. Jes, la peza spirado de la funkciantaj maŝingigantoj. La uzino entendiĝas sur 500 hektaroj. Tia industria establaĵo estis antaŭe neniam konstruita en Hungario. — En ĝia planado partoprenis konsilantoj el la amikaj landoj, resp. ili kreis la gvidplanon, laŭ kies bazo hungaraj fakuloj faris la finplanojn.

La plej ĝusta metodo por ekkoni la metalurgian kombinumon estas, se ni konatiĝas kun la unuopaj uzinpartoj laŭ logika sinsekvo, ĉar cetere por la legantoj restas pri la uzina kombinumo nur ia fascinanta, sed esence tute neordigita impresaro.

Dunai Vasmű estas metalurgia fabriko kun kompleta vertikaleco. Tio signifas, ke el la fererco fariĝas unuparte ŝtalaj ingotoj, mulditaj ŝtalblokoj taŭgaj por laminatado, aliparte laminatitaj ŝtalladoj. Tio signifas, ke per bazmaterialoj la uzino mem zorgas ankaŭ pri koakso, elektra- kaj termo-energioj. Oni produktis unuafoje en Hungarlando en Dunai Vasmű per enlanda karbo koakson taŭgan por metalurgiaj celoj. La gaskvanton ricevitan per helpo de la koaksiga procedo prilaboras aparta kemia fabriko. El gaso oni produktas i. a. artefaritan azotsterkon, benzolon, gudron kaj diversajn aliajn bazmaterialojn por medikamentoj kaj farboj.

La produktado de krudfero okazas en du altfornegoj. La krudfero estas liverata de la altfornego al la ŝtalfabriko, kie oni muldas ingotojn. Poste sekvas la laminatado. La varma laminatejo fabrikas en la unua etapo ladoblokon, kiu fariĝas ŝtalladoj dika kaj mezdika per la sekvaj procedoj.

Apud la varma konstruiĝis ankaŭ la frida laminatejo, kie estas produktataj la fride laminatitaj ŝtalladoj maldikaj, acidtrempitaj, stanitaj k. c.

La fabriko por fajrorezistaj brikoj kontentigas ne nur la pretendon de Dunai Vasmű, sed ĝi produktas ankaŭ por aliaj metalurgiaj fabrikoj, eĉ por eksporto.

La energicentralo de Dunai Vasmű havas potencan kapaciton. Ĝi donas ankaŭ kurenton kaj varmegan akvon bezonatan por la telehejtado de la urbo.

La maŝinfarejo produktas ne nur rezervajn maŝinpartojn por la hungaraj uzinoj, sed ĝi fabrikas ankaŭ apartajn maŝinojn laŭ mendo. Konsidere de nombro de la gelaboristoj ĝi estas nomebla jam maŝinfabriko mezgranda.



Unu el la maŝinoj, per kiuj produktiĝas la perforitaj ŝtalladoj. Foto de HTA.

La hungaraj metalurgiaj fabrikoj estas diverspecaj kaj okupiĝas pri ĉiu branĉo de la fero-metalurgio. Simile al la metalurgiaj fabrikoj de la mondo kaj konforme al la pretendoj de la nuntempo ili kontribuas per enkonduko de ĉiam pli novaj produktoj al kontentigo de la fer- kaj ŝtalbezono de la lando. Niaj produktoj, superantaj la kvanton de la enlanda bezono, estas altkvalitaj kaj serĉataj varoj sur la eksterlandaj merkatoj.

Stefano BENCSIK

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

La plej alta hungara viro. La semajna gazeto de la hungara junularo „Magyar Ifjúság" alvokis siajn legantojn, serĉu kaj trovu la plej altan homon de la lando. Laŭ la rezultoj de la esploro la plej alta homo de Hungario pruviĝis Mihály Krulák, kiu vivas en farmeto kaj nuntempe li estas 217 cm alta. Sed li povas ankoraŭ kreski, ĉar en oktobro li festis nur sian dudek trian naskiĝtagon. Antaŭ kelkaj semajnoj li maldikiĝis pro operacio per kelkaj kilogramoj, pro tio nun li pezas nur naŭdek ok kilogramojn, sed estas karakterize je lia staturo, ke li havas kvindek tri centimetran ŝuon.

*

Dudek- ok- jara taksiŝoforo en Budapeŝto, pasia longdistanca kuristo, okaze de la kvindek- jara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio kuris la 2226 kilometran distancon inter Budapeŝto kaj Moskvo. Li ekiris, pli ĝuste: ekkuris de Budapeŝto la 29-an de septembro, ĉiutage kuris meze sepdek kilometrojn kaj ripozis ununuran tagon. Li alvenis al Moskvo la 7-an de novembro. La nomo de tiu ĉi brava junulo estas: György Schirilla.

*

Inter Hungario kaj la okcidentaj landoj, por la evoluigo de la interrilatoj, okazas ĉiam pli multaj paŝoj. Sukcesohava ekzemplo estas ankaŭ tiu plur-mil-kilometra vojaĝo, kiun deputacio konsistanta el la hungara ministro de la komerco kaj el aliaj altranguloj faris en la Sud-Amerikaj landoj. Ili subskribis ekonomiajn, kulturajn kaj teknikajn interkonsentojn kun pluraj sudamerikaj landoj. Estas kompreneble, ke Hungario ankaŭ estonte opinias grava la evoluigon de ĉiuspecaj interrilatoj ankaŭ en Eŭropo.

*

Lord Erroll of Hale, prezidanto de la komerca ĉambro de London vizitis Budapeŝton kune kun dudek- membra deputacio. Li konstatis, ke la hungaraj-anglaj ekonomiaj kaj teknikaj interrilatoj estonte povus kreski en pli granda mezuro, ne lastvice sekve de la hungara ekonomia reformo.

*

Ankaŭ en Parizo okazis traktadoj tre interesaj. La franca kaj la hungara gazetaro favore skribis pri la evoluigo de la industria kunlaboro, pri la kondiĉoj pli favoraj de la varinterŝanĝo inter la du landoj.

*

Pri la bona vojo de la kulturaj interrilatoj atestas la Londona vizito de la hungara kulturafera ministro, kaj la de li malfermita grandskala hungara belarta ekspozicio en la muzeo Viktoria kaj Alberto. La hungarajn artobjektojn — asekuritajn je du milionoj da pundoj, oni liveris per fervojo kaj ŝipo en Anglion.

*

Mortis d-ro Frigyes Kürschner en 1967 en sia 70-a jaro. Li estis dum duonjarcento fidela adepto de Esperanto. Li laboris ankaŭ aktive por nia movado, precipe en la 1920-aj jaroj. Kürschner dum la tempo de la nazioj suferis en la morttendaro de Mauthausen. Eĉ tie li helpis multege kaj kuraĝe al siaj sortkunuloj, ankaŭ kiel kuracisto. Post la liberiĝo li aktive partoprenis en la rekonstruaj laboroj, fervore agadis en la Partio, en la Sindikato kaj en la VIII-a distrikta magistrato de la ĉefurbo. Nia eminenta amiko forpasis tiel senbrue kaj modeste — kiel li vivis. Ni ne forgesu pri lia ekzemplodona utila vivo, ni prezentu lian vivovojon al la novaj generacioj.

*

Kisfaludi Strobl Zsigmond, plej eminenta hungara skulptoartisto, amiko ankaŭ de Esperanto (v. pri li nian artikolon 1964/2.), rememoris pri sia vizito al Volgograd (Stalingrad). Ankaŭ kiel skulptisto li spektadis la grandiozan skulptaĵon de la batalo Stalingrad. „Tiu ĉi monumento — li diris — estas plej granda en la tuta mondo. Ĝia kompozicio kaptas-ravas la homon. Ĝi komenciĝas ĉe piedo de la monto kaj iom post iom ĝi pasas al la montopinto, al la virina figuro 82 metrojn alta. La figuro simbolas la patrujon." — „Per suprenlevilo (lifto) ni pasis ĝis la alteco de la brakoj, kaj en la horizontale etendita maldekstra brako ni promenis" — diris Kisfaludi Strobl.

*

Mondliteratura Leksikono estas redaktata en Budapeŝto. La grandioza verko havos ses dikajn volumojn, la unua aperos espereble en 1968, la sesa volumo en 1971 aŭ 1972. La tekston ilustros ĉ. sesmil fotoj. „El la similaj verkoj tiu nia leksikono kiel unua prilaboros la literaturon de Esperanto, kaj ankaŭ la literaturon de Sudorienta Azio kaj Afriko" — ni informiĝis el la ĵurnalo „Magyar Nemzet". La redaktoro de la Esperanto-temaj artikoloj estas prof. d-ro István Szerdahelyi.

*

La spirita, faka aŭ alispeca konkursado (demandoj kaj respondoj) ankoraŭ daŭras esti modo en Hungario. Béla Kalauz, seruristo de la maŝinfabriko Ganz-MÁVAG estis la unua ĉe la faka konkuro de la uzino. Lia premio estis: senpaga vojaĝo al Moskvo kaj Volgogrado.

„*Mi estas 27-jara* — diris Béla Kalauz — kaj nun mi transpaŝas la unuan fojon la limon de mia patrujo. Bedaŭrinde mi ne parolas la rusan lingvon, sed mi esperas, ke ankaŭ kun la lingvo Esperanto mi bone prosperos kaj povos komprenigi min kun la sovetaj faklaboristoj. Cetere mia grupo partoprenos la solenaĵojn ĉe Volgograd."

*

Ankaŭ multaj hungaraj pastroj faris studvoĵagon en Sovetunio. En kadro de la pacmovado aŭtune dekkvin katolikaj pastroj el departemento Veszprém vizitis Moskvon. „Ni faris honorviziton ankaŭ ĉe tombo de la Nekonata Soldato — diris la parohestro Lajos Heves. — Apud ni staris aĝa virino, eĉ nun ploranta pro siaj kvar mortfalintaj filoj. Kiel pastroj ni atentis la signojn de la socialisma patrujamo per specifa interesiĝo, kaj animskue ni aŭskultis la militajn rememorojn.

*

Multspecaj grotosistemoj estas troveblaj en Hungario. Ili diferencas unu de la alia laŭ siaj estiĝo kaj grandeco. Unu el la plej interesaj grotoj estas la Buda-Fortikaĵa Grotaro, kiu formiĝis en „stomako" de la Fortikaĵ-monto, konsistanta el kalkŝtono. Kunlaboris en la elformiĝo la kemiaj kaj fizikaj fortoj de la akvo dum jarmilionoj kaj la interveno de la homa agado dum jarcentoj. En la dolĉakva kalkŝtono kaj kalkargilo laŭ natura maniero estiĝintajn vojstrekojn oni modifadis por la celoj de la fortikaĵo kaj laŭ la strategiaj taskoj de la historiaj epokoj. La temperaturo en la grotaro estas vintre-somere 16° C. De kelka tempo la grotaro estas spektebla ankaŭ fare de la publiko.

*

La rajdosportoj ekprosperis en Hungario en la lastaj jaroj. Unu post la alia fondiĝis la rajdistaj lernejoj kaj kluboj. Nuntempe agadas el ili tridek du en nia lando. Entute mil sportĉevaloj staras je dispono de la amatoraj sportistoj en la rajdo-lernejoj. Evoluegis ankaŭ la rajdista turismo. De kelkaj jaroj la rajdo-lernejoj aranĝas por eksterlandanoj rajdo-ekskursojn. Ĉefe el Germana Federacia Respubliko, Svislando, Nederlando, Danio, Svedio, Aŭstrio kaj Anglio alvenis rajdistoj.

Aladár PUY:

LA BREDADO DE LA HUNGARAJ HUNDOSPECOJ

La Landa Asocio de la Hungaraj Hundbredistoj (MEOE) fondiĝis en 1899. La mondorganizaĵo de la hundbredistoj (Fédération Cynologique Internationale = FCI) akceptis nian asocion inter siajn membrojn-asociojn en 1933. La tasko de la Asocio estas evoluigi la kinologion (scienco pri la hundo) en Hungarujo, kaj en ties kadro akceli unuavice la bredadon de la speciale hungaraj hundospecoj. Tiun ĉi laboron plenumas centra gvidantaro kaj kontoro en Budapeŝto, krome 10 landaj specosekcioj kaj 20 provincaj lokaj grupoj, ĉiuj en la kadro de MEOE. La principan fakan gvidadon faras la Breda kaj Ekzerca Sekcioj, dum sur la kampo de la praktiko funkcias kaj en Budapeŝto kaj en provinco grupoj por eduki ĉashundojn, policajn kaj militajn deĵorhundojn, melo- kaj vulpokaptajn hundojn kaj fine porblindulajn kondukhundojn.

La altnivela hundostoko, kiun ni havis antaŭ la dua mondmilito, preskaŭ tute neniiĝis. La restintan malmultnombran purrasan hundostokon ni sukcesis levi sur la hodiaŭan nivelon nur koste de malrapida kaj oferoplena laboro.

Estas kurioze mencii, ke dum antaŭ la dua mondmilito oni registris tri milionojn da hundoj en Hungarujo, hodiaŭ oni registras nur unu milionon kaj tricentmil hundojn.

Laŭ la statuto de FCI ĉiu lando fiksas mem la normon (specopriskribon) de siaj naciaj hundospecoj. FCI konfirmas la normojn kaj sciigas ilin al ĉiuj membrolandoj. Tio okazis ankaŭ koncerne la hungarajn hundospecojn. De tempo al tempo la normojn oni translaboras. En 1966, dum la kinologia kongreso Hungaria la bredistoj de la hungaraj hundospecoj, kunvenintaj el ĉiuj partoj de la mondo, pridiskutis kaj kunordigis la celadojn kaj gvidprincipojn de la bredado de la unuopaj hungaraj specoj.

La hungaraj hundospecoj jam estas bredataj en konsiderinda nombro kaj hejmlande kaj eksterlande. La *viĵlon* oni bredas en Usono, Kanado kaj Aŭstralio en memstaraj kluboj, dum en Svislando, Italujo, Grekujo kaj Okcidenta-Germanujo oni bredas ĝin individue. En memstaraj kluboj oni bredas la *puleon* en Usono, Aŭstralio, Israelo, Aŭstrujo kaj Orienta-Germanujo. Cetere ĉiuj ĉi specoj hodiaŭ estas jam bredataj sur ĉiuj partoj de pluraj kontinentoj.

Sub la patronado de FCI en septembro de ĉiu jaro MEOE aranĝas sian internacian hundekspozicion, en kiu krom la hejmlandajn titolojn oni aljuĝas ankaŭ la proponojn de la Mondorganizaĵo koncerne la *Internacian Ĉampionecon de Beleco.*

La mallonghara viĵlo

El la hungaraj hundospecoj estas pleje serĉata la VIĴLO (proponata Esp. termino el la hungara hundonomo ‚vizsla', france: le braque hongrois). Tiu ĉi eminenta ĉashundo ekzistas en du har-alternativoj. Kaj la mallonghara kaj la drathara specoj havas bonegan flarkapablon, estas lernemaj, senpretendaj kaj tre fidelaj. Pro tio ili estas tre ŝatataj. Dorspint-alteco ĉe virhundoj 57—62 cm-oj, ĉe inoj 53—58 cm-oj. Koloro: flave-bruna.



La drathara viĵlo



La hungara vertrago

La HUNGARA VERTRAGO, hungare ‚agár', france: le lévrier hongrois) estas bedaŭrinde en stato formortanta, sed en la plej lastaj tempoj oni denove ekzorgis pri ĝia bredado, ĉar oni ekvidis ĝian signifon en la eksterlande tiom ŝatataj leporhund-konkursoj, kiujn oni baldaŭ regule aranĝados ankaŭ ĉe ni. Ĝiaj haroj estas mallongaj, en kolornuancoj nigra, skarlata, kafobruna kaj pizoflava, kun blankaj makuloj. Alteco de la dorsopinto 55—62 cm-oj.

La puleo

La PULEO (proponata Esp-a termino el la hungara ‚puli') estas la plej disvastiĝinta malgrandkorpa gregopela paŝtistohundo. Pro sia vigla temperamento, lernemeco kaj senpretendeco ĝi estas ĝenerale ŝatata. Ĝia longa, en vatecaj tufoj pendanta hararo estas nigra, ruĝe-nigra, griza, blankmiksitegriza aŭ blanka. Alteco de la dorsopinto ĉe virhundoj 40—44 cm-oj, ĉe inoj 37—41 cm-oj.

La pumio

La PUMIO (proponata Esp-a termino el la hungara ‚pumi') estas la dua malgrandkorpa gregopela paŝtistohundo, kun pli mallongaj haroj ol tiuj de la puleo, kaj kun suprenstarantaj oreloj. Koloroj: arĝentogriza, ardezogriza, blankmiksite-griza aŭ ruĝece-bruna. Dorspint-alteco 35—42 cm-oj.



La komondoro

La KOMONDORO (proponata Esp-a termino el la hungara ‚komondor') estas praa hungara gregogarda paŝtistohundo. Ĝiaj grandega staturo, en feltecaj tufoj pendanta hararo, timoveka aspekto destinas ĝin la plej bona garda-defenda hundo. Ĝi troviĝas nur en blanka koloro. Alteco de la dorsopinto ĉe virhundoj 65—80 cm-oj, ĉe inoj 55—70 cm-oj.



La kuvaso

La KUVASO (proponata termino el la hungara ‚kuvasz') estas nia dua grandkorpa grego- kaj domogarda paŝtistohundo-speco. Ĝia malpli longa hararo kaj pli gracila staturo igas ĝin ne tiel timiga kiel la komondoro, kaj ĝi estas tre ŝatata, fidela kaj senpretenda gardohundo. Kvankam nombre ĝi malpliiĝis, en la lastaj tempoj ĝojinde ĝi plimultiĝadas.

En niaj internaciaj ekspozicioj de jaro al jaro partoprenas ĉiam pli da eksterlandanoj. Ni esperas, ke la belan hundostokon, kiun ili vidas en nia lando, ili ĉiam pli ŝatos, sekve de kio en kreskanta nombro ni povos eksporti niajn hundojn.

Trad.: *Tibor UJLAKY-NAGY*

JUNULARO

STELO SUR LA ĈIELO KAJ FLORO SUR LA TERO

Malgranda stelo bele brilis sur la ĉielo. Bona knabineto foje rigardis sur la ĉielon, kaj tre ekplaĉis al ŝi la brila steleto. Ŝi diris al sia patrino:

— Kara Panjo! Mi tre ŝatus havi tiun steleton! Prenu ĝin de la ĉielo kaj portu ĝin al mi!

Ŝi estis tiel bona knabineto, ke ŝia panjo tuj volis depreni la stelon. Ŝi etendis la manon, la brakon, tiel longe, kiel ŝi povis fari tion, sed la stelo estis tre malproksime, kaj ŝi ne povis plenumi la peton de la filineto.

— Mi ne povas ĝin atingi — diris la patrino.

— Panjo mia, stariĝu sur viaj piedpintoj — petis la filineto la patrinon.

La kara patrino vere stariĝis sur siaj piedpintoj, sed la steleto ankaŭ nun estis tre malproksime, do ŝi ne povis atingi ĝin.

— Kara Panjo, mi petas vin, staru sur la seĝon — petegis ŝin la bona knabineto.

La kara patrino tuj ekstaris sur la seĝon, sed ankaŭ nun ŝi ne povis atingi la steleton sur la ĉielo. Sur la korto staris alta arbo kaj apud ĝi estis apogita ŝtuparo. Nun la knabineto diris:

— Panjo iru supren sur la ŝtuparo, kaj tiel portu por mi la steleton.

Panjo tuj grimpis sur la ŝtuparon, sed vane ŝi etendis sian manon, ankaŭ nun ŝi ne povis atingi la malproksiman steleton.

La bona knabineto nur rigardis, rigardadis al la ĉielo, kaj la panjo tre malĝojis, ke ŝi ne povas porti la stelon por la knabineto. Panjo iris malsupren de la ŝtuparo, prenis la

maneton de la filineto, tiel ili iris en la ĝardeno.

La bona knabineto plu rigardadis sur la ĉielon, ŝi foje preskaŭ falis pro ŝtonego, sed la panjo forte tenis ŝian maneton. La knabineto nur rigardis la ĉielon, panjo rigardis la teron, por vidi, ĉu ne estas iu ŝtono sur la tero.

Panjo rigardas, rigardadas, foje ŝi ekvidas steleton sur la tero, tuj antaŭ iliaj piedoj. Ŝi tuj haltis, kaj haltigis ankaŭ sian filineton, por ne difekti la steleton. Sed ĝi estis bela, eta, flava floro, ĉirkaŭe kun etaj floraj folioj.

— Rigardu, panjo — kriis la knabineto — ĝi estas ĝuste tia, kia la stelo estas.

Panjo malrapide, gardeme deŝiris la belan malgrandan oran floron, donis ĝin al la bona knabineto, kiu tre-tre ĝojis pro ĝi.

Poste ili serĉis kaj ankaŭ trovis sur la tero ankoraŭ multajn stelajn floretojn, ili ligis florkronon el la floretoj, ĝin ili metis sur la kapon de la bona knabineto. Kaj ŝi estis nun tia, kvazaŭ ĉiuj steloj de la ĉielo brilus sur ŝia kapo.

Irén L. SZÁSZ

Interamikiĝo de hungaraj kaj polaj gelernantoj

En januaro 1967 alvenis letero el la pola urbo Zary al la gazeto „Világ Ifjúsága", en kiu la tiea E-grupo serĉis korespondanton kun samfakaj gejunuloj de Hungario. Post leterŝanĝado Budapeŝta ekonomia mezlernejo (kie Esperanton instruas Béla Legény), akceptis inviton por dusemajna restado en Pollando. La 16-an de julio ĉe la pola-ĉeĥa limstacio la hungarojn jam atendis la polaj gastigantoj kun aŭtobuso, kun 4-membra orkestro kaj kun malgranda ĵipo, kiu portis la tendojn. Kaj dekses lernantinoj sub gvido de Béla Legény pasigis du belajn semajnojn en Pollando. (Poznan, Zielona Góra, Zary, Opole, Katowice ktp.) La gastigado estis tute senpaga, la hungara grupo traveturis en Pollando 2880 kilometrojn. En 1968 la hungaraj gejunuloj gastigos la polajn amikojn. Ili restados unu semajnon ĉe la lago Balaton kaj unu semajnon en Budapest.

Miklós LETT:

La historio de Hungario en spegulo de poŝtmarkoj

Ĉe la fino de la unua mondmilito la Aŭstra-Hungara Monarkio disfalis. La subpremitaj popoloj eliĝis el la Monarkio, kaj formis memstarajn, naciajn ŝtatojn. La 30—31-an de Oktobro 1918 la revolucia movado de la popoloj ankaŭ en Hungario ĉesigis la reĝlandon kaj fondis respublikon. Dum tiu ĉi burĝa-demokrata revolucio prenis la potencon registaro, kiu formiĝis el la deputitoj de la socialdemokrata kaj burĝaj partioj. La gvidanto de la ministraro fariĝis grafo Mihály Károlyi, signifa opozicia politikisto de tiu ĉi epoko. (Fig. 130, eldono en 1962). Oni presis la surskribon KÖZTÁRSASÁG (Respubliko) sur ĉiuj poŝtmarkoj, kiuj estis tiam uzataj (Fig. 128—1918) kaj en la jaro 1919 oni eldonis novajn seriojn kun la sama desegnaĵo, sed la surskribo estis: „Magyar Posta" (Hungara Poŝto).

Pro la akriĝo de la revolucia situacio kaj pro la teritoria postulo de la venkintoj, la registaro Károlyi abdikis. La Hungara Komunista Partio, kiu fondiĝis la 24-an de Novembro 1918 (Fig. 133, la poŝtmarkon oni eldonis por la 40-jara datreveno de la fondiĝo, en 1958), unuiĝinte kun la Socialdemokrata Partio, la 21-an de Marto fondis Konsilantarrespublikon. La registaro estis la Revolucia Reganta Komisariato, ĝia gvidanto Béla Kun (Fig. 140—1966), komencis la socialisman transformon de Hungario, oni kolektivigis la grandbienojn, la granduzinojn kaj la bankojn. Dum sia mallonga ekzistado la Konsilantarrespubliko faris multajn ekonomiajn kaj kulturajn reformojn.

Oni presis sur la uzatajn poŝtmarkojn MAGYAR TANÁCSKÖZTÁRSASÁG (Hungara Konsilantarrespubliko), (Fig. 132, 135) kaj oni eldonis poŝtmarkserion kun la portretoj de Karl Marx (Fig. 129), Friedrich Engels kaj ankoraŭ kun kelkaj eminentuloj, kiujn ni jam montris en niaj antaŭaj artikoloj: György Dózsa (Fig. 45), Ignác Martinovics (Fig. 78) kaj Sándor Petőfi (Fig. 136, parto de la bildo).

La kapitalismaj landoj volis faligi la Konsilantarrespublikon kaj kun grandaj armeoj ili komencis novan militon. La popola reĝimo volis kontraŭstari al la granda superforto, sed post 133-taga ekzisto ĝi devis forlasi la potencon.

Tiun ĉi heroan epokon memorigas pluraj poŝtmarkoj. En 1949 oni eldonis memorserion (Fig. 134, 136) kaj oni uzis por ĝi samajn portretojn de Marx kaj Petőfi, kiuj ornamas la poŝtmarkojn de la Konsilantarrespubliko. En 1954, por la 35-jara datreveno oni eldonis poŝtmarkojn, kiuj montras la klerigan agadon (Fig. 139) kaj la patrujdefendan militon de tiu popola reĝimo (Fig. 141, 142). Por la kvardekjara datreveno en 1959 oni eldonis memorpoŝtmarkojn (Fig. 137). Ni devas ankoraŭ mencii la gazeton de la Hungarlanda Komunista Partio: „Vörös Újság" (Ruĝa Ĵurnalo), kiun oni fondis la 7-an de Decembro 1918. Oni eldonis memorpoŝtmarkojn por ĝia 40-jara datreveno en 1958 (Fig. 138).

8,— Ft

Knabinoj de la vilaĝo Sárpilis pentras la paskan ovon

Ĉefurbaj geknaboj en la Urba Arbareto